

1981 oktobro

74-a jaro


n-ro 910 (10)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Generaciaj aspektoj por Antverpeno

Vi trovos

materialon pri la granda jubileo sur la unuaj du paĝoj de ĉi tiu numero. Kiel ni diras en tiu teksto mem, temas pri malneto, kiu nun estas antaŭ ĉiu movadano por bonvola priekzameno, kompletigo, kunlaboro. La numero enhavas ankaŭ kelkajn brazilajn postrikoltaĵojn. Ne ĉiujn, ĉar ni espereble ankoraŭ longe rikoltos la fruktojn de la unua Universala Kongreso sude de la ekvatoro. Tamen, ĉi tiu numero jam plurloke enfokusigas la venontjaran Kongreson en Belgio. Tiel estas, tiel ankaŭ devus esti: mankas tempo funde okupiĝi pri la okazintaĵoj, atenton vokas novaj planoj kaj agadoj. La centjaran jubileon ni aludis ĉi-supre, sed vi rimarkos tra la numero, ke ankaŭ aliaj jubileoj okazis kaj okazas: Sennacieca Asocio Tutmonda fariĝis 60-jara en aŭgusto, grava Esperanta poeto el Ĉeĥoslovakio (vidu la paĝon 177) estas 75-jara. Malfrue (aŭ preskaŭ malfrue) ni konsciiĝis pri alia jubileulo. Ni do notas ĉi tie, kun bondeziroj, la 80-jariĝon de Tiberiu Morariu, tiu post Andreo Cseh plej fama rektmetoda instruisto de Esperanto. Morariu naskiĝis la 28an de septembro 1901 en Rumanio, sed li jam de jardekoj vivas en Svedio. Tiom ĉi-foje!

Enhavo

- 161 Preparoj por la Jubilea Jaro 1987: Jubileo kiel invito intensigi la agadon (Estraro de UEA)
- 163 Parolado de la Ĝenerala Direktoro de UEA: Por superi la epokon de la velŝipoj (Victor Sadler)
- 165 Kongresa temo por Antverpeno: Generaciaj aspektoj de la Esperanto-movado (Humphrey Tonkin)
- 166 Renkontiĝo de ĉinaj esperantistoj: Vera erupto ankoraŭ venos (Ikso); Ĉina reeĥo de la 66a UK
- 167 Publika kunsido de la Akademio: Valora kaj ripetinda; Renkontiĝo de Esperantaj Familioj: Grandega stimulo por infanoj (Zlatko Tišljar); Novaĵo en la Belartaj Konkursoj: Infanlibro de la Jaro
- 168 Faka agado: Esperanto en muzeologia terminaro (Bernard Golden)
- 169 Revizora raporto (E.J. Woessink kaj T. Boersma)
- 170 Recenzoj: "La internacia lingvo — sciencaj aspektoj" kaj "Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado" de Detlev Blanke (Michel Duc Goninaz); "Esperanto-vortaro per temo-tabeloj" de Michele Mariano (G. Waringhien); "La fatomaŝino" de Ĵan Kokto' / G. Lagrang' (Mauro Nervi)
- 172 Laste aperis. . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 173 Kongresa komuniko (novaĵoj pri la 67a Universala Kongreso en Antverpeno)
- 175 TEJO-paĝo: Landaj sekcioj: BEJO volas kongresi; Labortendaroj: Inundo de informpetoj
- 176 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 177 Nekrologoj (T. Aardestrup, Y.M. Canty, F. Diez Mateo, W.G. van Eijndthoven, T. Gregurek, E. Kull, H.A. Leijder, J.W. Leslie, Martinus, S. Matuda, E. Pharo, L. Siekierski, E. Tóth, D. Vahen-Svetinov, E.D. Walters)
- 178 Oficiala informilo de la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio
- 179 Kotiztabelo por 1982
- 180 Anoncetoj

La kovrilo

Ĉu la kovrila triopo antaŭĝojas pri la elekto de la kongresa temo por la 67a UK en Antverpeno? Ni dubas. Ili gajas, ĉar ili simple apartenas al la rida generacio. Eĉ se ili havas siajn generaciajn problemojn, iu alia solvos aŭ provas solvi ilin. La triopo ne estas tute hazarde sur nia kovrilo. Plimulto el ili estas antverpenanoj, kvankam ne denaskaj, kaj esperantistoj, ja denaskaj. Ili antaŭĝojas pro la venontjara Infana Kongreseto en Antverpeno. (Foto: T. Kehlet)

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenwg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto). Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). Legata en 102 landoj. Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo varias laŭlande. Petu de via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero 4,— gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri financo kaj administrado: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Vicprezidanto kaj estrarano pri planado kaj landa agado: d-ro Renato Corsetti, Via Strabone 1, I-00176 Roma, Italio; tel. (06) 29 26 07.

Vicprezidanto kaj estrarano pri kulturo kaj edukado: s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavik, Islando; tel. (91) 3 73 01.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23-274.

Estrarano pri informado kaj delegita reto: s-ino Ursula Grattapaglia, C.P. 04-0097, BR-70000 Brasília (DF), Brazilo; tel. (061) 226-8101.

Estrarano pri kongresoj kaj virina agado: s-ino Eliza Kehlet, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio; tel. (031) 51 46 36.

Estrarano pri faka agado: s-ro Petăr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario.

Estrarano pri esploroj kaj kunordigo de eksteraj rilatoj: prof. Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce Street, Philadelphia, PA 19104, Usono; tel. (215) 387-8288.

Jubileo kiel invito intensigi la agadon

LA TUTA ESPERANTO-MOVADO, ĉiuj parolantoj kaj amikoj de la Internacia Lingvo, staras antaŭ unika jubileo — la centa datreveno de Esperanto en julio 1987. Jam de kelkaj jaroj la jubileo fariĝas pli ofta temo en kunvenoj kaj kongresoj sur ĉiuj movadaj niveloj. La Estraro de UEA unuafoje traktis tiun temon en sia kunsido dum la 64a Universala Kongreso de Esperanto, en julio 1979 en Lucerno. Tiu tagorda ero revenis al la estraraj kunsidoj de novembro 1979 kaj de marto ĉi-jare. Unuafoje pri la Jubilea Jaro okupiĝis ankaŭ la Komitato de la Asocio en siaj kunsidoj dum la 66a UK en Brazilio. La Komitato tie akceptis apartan rezolucion, kiu tekstas jene:

Komitata rezolucio pri la Jubilea Jaro

La Komitato de UEA, traktinte la malnetan "Planon por la periodo 1983-1987", ellaboritan de la Estraro en 1979 kaj akceptitan en sia nuna formo en marto 1981,

aŭdinte raporton pri la ĝenerala stato de la preparlaboro por la jubileo de Esperanto en 1987,

preninte en konsideron proponojn ricevatajn de aliaj Esperanto-organizoj kaj aliajn sugestojn kaj modifojn de la Komisiono pri Planado kaj la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj,

konstatinte, ke en marto 1981 la Estraro starigis komisionon por realigi la supre menciitan Planon kaj ĝenerale prepari la grundon por la Jubilea Jaro,

komisias la Estraron

- daŭrigi kaj intensigi la preparlaborojn jam faritajn por realigi la Planon por la Periodo 1983-87, kun modifoj enkondukitaj de la supre menciitaj komisionoj,
- plue adapti la Planon laŭ sia bontrovo kaj laŭ la intereso de la Asocio,
- sondi ĉe aliaj organizoj pri la ebleco formi komunan Honoran Patronan Komitaton por la Jubilea Jaro,
- kunlabori kun aliaj organizoj en spirito de harmonio, por kunordigi la diversajn laborplanojn de la diversaj organizoj,
- instigi la landajn kaj fakajn asociojn rilati kun la Estraro pri siaj planoj.

Kiel la rezolucio aludas, la "Plano por la periodo 1983-1987" estas malneta, ĉar ĝi restas malfermita kaj modifebla kunlabore kun aliaj Esperanto-organizaĵoj. Kion enhavas tiu malneta Plano? Kvankam povus montriĝi nekonvene publikigi la Planon en ĝia nuna formo, la Estraro volas ankaŭ en ĉi tiu kazo sekvi la plej demokratikan vojon antaŭ ol definitivigi tiun gravan dokumenton. Ni publikigas ĉi tie la malneton de la Plano, por ke ĝi estu bazo de kiel eble plej vasta disku-

to. Tre verŝajne la Komitato de UEA povos definitivigi la Planon dum la 67a Universala Kongreso en Antverpeno, en julio 1982.

Plano por la periodo 1983-1987

Enkonduko: Ekzistas bona ebleco, ke la Ĝenerala Asembleo de UN nomos la jaron 1983 Internacia Jaro de Komunikado. Tiu jaro estu la komenco de kvinjara periodo, en kiu UEA donos apartan publikan atenton al internacia komunikado kaj la rolo de Esperanto en tiu komunikado. La diversaj aktivecoj atingu sian kulminon en 1987, la Jaro de la Internacia Lingvo.

Organiza formo: UEA nomu gvidanton de la programo kaj donu al tiu persono la necesan teknikan helpon. Ĝi formu Patronan Komitaton por la kvinjara periodo. La kernon formu la Honora Patrona Komitato de UEA, kaj al tiuj homoj oni aldonu pliajn, elektitajn laŭ la sugestoj de landaj asocioj, laŭ la listoj de patronaj komitatoj de UK-oj pasintaj ktp. Tiun Patronan Komitaton oni starigu ĝis la fino de 1982. Oni instigu la landajn asociojn formi siajn proprajn tiajn patronajn komitatojn, kiuj konsistu el anoj de la internacia komitato plus aliaj.

Celoj: 1) Vasta publika atento pri a) lingva diskriminacio, b) lingvaj problemoj, kaj c) la historio, nuna stato kaj perspektivoj de Esperanto. 2) Konkreta rekono de Esperanto fare de la ĉefaj internaciaj organizoj kaj la ĉefaj registaroj de la mondo. Tiu rekono povus havi plej variajn formojn, de simplaj deklarioj aŭ rezolucioj ĝis praktika utiligo de la Internacia Lingvo. 3) Vasta pligrandigo de la nombro de simpatiantoj al Esperanto, kiuj havu vojon por identigi sin kun Esperanto, kaj kun la lukto kontraŭ lingva diskriminacio kaj lingvaj problemoj.

Kongresoj Universalaj: Tiu de 1983 pritraktu komunikadon teknologion en rilato al Esperanto. Tiu de 1987 okazu prefere en Varsovio, kaj havu la formon de Festivalo de Esperanto, prefere du semajnojn longa, kiu emfazu kaj la centjariĝon de la E-kulturo kaj la praktikan utiligon de Esperanto. Prefere la Kongreso inkluzivu la tagon de aperigo de la Unua Libro. Estu enplektita en la aferon je plej alta nivelo la pola registaro, kaj estu paralelaj publikaj eventoj por la neesperantista pola publiko.

Simbolo: Oni (UEA) lanĉu konkurson por taŭga simbolo por la festado. La simbolo estu vaste uzata sur la leterpapero de UEA, en ties eldonaĵoj ktp. UEA instigu aliajn Esperanto-organizaĵojn uzi ĝin.

Eldona agado: 1) Ĝis 1983 eldono de terminaro(j) pri aspektoj de komunika teknologio kaj popularscienca(j) verko(j) pri tiu temo. 2) Ĝis 1987 eldono de *Enciklopedio de Esperanto*. 3) Ĝis 1985 eldono de nova

Esperanta antologio. 4) Ĝis 1984 eldono de nova *Fundamenta krestomatio*. 5) En 1987 jubilea numero de la revuo en pluraj naciaj lingvoj. 6) Ellaboro de baza libro (kun ilustraĵoj) pri Esperanto kaj ĝia historio, kaj aperigo de tiu libro (pere de nacilingvaj eldonejoj) en kiel eble plej multaj lingvoj. 7) Ellaboro de volumo de selektaĵoj el la verkoj de Zamenhof, kaj ĝia nacilingva aperigo pere de nacilingvaj eldonejoj.

Gazetaro: Instigo al taŭgaj nacilingvaj gazetoj en diversaj landoj aperigi specialajn numerojn aŭ unuopajn artikolojn pri Esperanto okaze de la jubileo. Ellaboro tiucele de baza fotaro disponebla al gazetoj, kaj de bazaj artikoloj. Apartaj klopodoj ĉe internaciaj gazetoj (ekzemple de int. organizoj) kaj ĉe naciaj gazetoj internacie distribuataj (ekzemple *Time*).

Konferencoj kaj kongresoj: 1) Instigo al fakaj organizoj, ke ili dediĉu apartan atenton al Esperanto en siaj konferencoj kaj kongresoj. 2) UEA mem kunvoku, eventuale en kunlaboro kun kelkaj internaciaj neesperantistaj fakaj organizoj, internacian konferencon pri la historio de Esperanto, prefere en 1983, kaj pri la lingvo Esperanto, prefere en 1985. Precipe tiu de 1983 instigus specialistojn produkti materialojn sia-vice utiligeblajn en la festado de la jubileo.

Poŝtmarkoj: Sistema agado por konvinki la poŝtajn instancojn de la diversaj landoj aperigi poŝtmarkojn okaze de la jubileo.

Edukado: 1) Lanĉo de koresponda universitato, kiu uzas Esperanton. 2) Pretigo de taŭga materialo pri la jubileo por utiligo en lernejoj. Distribuo rekte al la diversaj landoj, aŭ pere de Unesko.

Televido: Granda kultura aŭ populara evento okaze de la jubileo, kun internacia partopreno, kaj tutmonda disvastigo. UEA faru kontakton kun televidaj instancoj kaj aliaj influuloj por atingi tion.

Enlanda agado: Ĉiu lando havu sian propran planon, kunordigitan kun tiu de UEA. En 1987 mem, okazu

kunordigita(j) aktiveco(j), internacie atentokapta(j), en kiel eble plej multaj landoj samtempe. Ili inkluzivu okazojn por neesperantistoj montri sian solidarecon kun esperantistoj aŭ sian solidarecon kontraŭ lingva diskriminacio.

Informiloj: UEA aperigu glumarkojn k.s. objektojn. Ĝi organizu afiŝan konkurson, ekzemple por 1982, kaj eldonu la plej bonajn afiŝojn.

Ekspozicio: Ĝis 1983 UEA eldonu porteban kaj facile munteblan ekspozicion pri Esperanto, kaj ĝi ĝisdatigu ĝin de tempo al tempo.

Intensa laborado prefere ol festa kampanjo

La malneto de la Plano ne antaŭvidas iun aparte grandiozan kampanjon, kies celo estus atingi de palpeblaj rezultoj rilate la ĝeneraligon de la uzo de Esperanto en la internaciaj rilatoj. Male, la Jubilea Jaro devus servi kiel aktuala instigo al intensa, bone pripensita ekstermovada informa laboro kaj kiel eble plej vasta diskonigo de la al ni — sed ne al la ekstera mondo — bone konataj argumentoj por Esperanto. La preparoj por la Jubilea Jaro ne devus esti unufoja fortostreĉo sed — prefere — nur konvena okazo por funde revizii kaj rafini la informan laboron kaj — eble plej esence — provizi tiun agadkampon per novaj kaj modernaj bazaj materialoj.

Kiel antaŭ kelkaj jaroj montris en Britio la agado okaze de la 100-jara datreveno de pra-Esperanto, la gazetaro ja interesiĝas pri Esperanto, se ni provizas aktualan kaŭzon. Necesas restudi tiun britan sperton. Ni devos esti pretaj por reagi al tiuj, kiuj konstatos malharmonion inter la revo de Zamenhof kaj la modestaj atingoj faritaj dum la cent jaroj poste. Nia argumentado tial devus ne troigi per la emfazo de historiaĵoj. Ni evitu krei la impreson, ke Esperanto estas nur interesa kulturhistoria fenomeno. Ni forte elstarigu la fakton, ke la esperantistoj estas pioniroj rilate la mondan konsciigon pri la internacia lingvo-problemo, ke ĝuste dank' al la klopodoj de la Esperanto-movado, dum la lastaj jaroj kreskas la preteco analizi tiajn problemojn, kia estas la kosto de la multlingveco en la internaciaj rilatoj.

Ni ne eniru la preparojn por la Jubilea Jaro kun iluzioj pri la proksimeco de la fina venko de Esperanto. Male, ni konsciu, ke restas ankoraŭ longa vojo por konvinki la amasojn pri Esperanto. Ni konsciu ankaŭ, ke la Jubilea Jaro donas al ni ĉiuj unikan okazon por progresigi la aferon de Esperanto en la mondo, kiu ĉiam pli kaj pli konscias pri la neceso de komuna kaj neŭtrala internacia komunikilo. Fine, estas ankaŭ tre grave, ke ni konsciu, ke ĉi-foje temas pri la centjara jubileo de la Zamenhofa lingvo, kiu devas unuigi nin ĉiujn, senrigarde al niaj movadaj apartenoj kaj preferoj. La Jubilea Jaro koncernas ne nur UEA, SAT kaj aliajn internaciajn kaj naciajn Esperanto-organizaĵojn, sed ĝi plene rilatas ĉiun unuopan parolanton kaj amikon de la Internacia Lingvo.

Estraro de UEA

Proponoj petataj

La ekvalidiĝo de la nova Statuto de UEA plejparte malaktualigis la Ĝeneralan Regularon. En la ĉi-lastaj dokumento estis faritaj kelkaj modifoj por eviti koliziojn kun la Statuto. Tio tamen estis nur provizora solvo, ĉar oni nepre devas reverki la tutan Ĝeneralan Regularon. La celo de tiu laboro estas ĝia modernigo kaj kiel eble plej perfekta konformigo al la Statuto. La Estraro komisiis al la Ĝenerala Direktoro de UEA ellabori la malneton de la Ĝenerala Regularo. Laŭ la planoj, la Estraro traktos la temon en sia venonta kunsido en marto 1982, la Komitato dum la 67a Universala Kongreso en Antverpeno. La membraro povas signife kontribui al la antaŭpreparoj: ĉiuj proponoj, opiniesprimoj kaj atentigoj estas tre bonvenaj. La sugestojn bv. sendi al la Centra Oficejo ĝis la fino de la kuranta jaro.

Por superi la epokon de la velŝipoj

NI DE MULTAJ JARDEKOJ havas t.n. Centran Oficejon de UEA. En kiu senco ĝi estas "centra", tio neniam estis tute klara. Efektive, nur en la lastaj jaroj ni komencis tute novan agadon en la asocia kadro, kiu fine donas sencon al tiu vorto. Tiun agadon, tiun novan linion, oni en la estraraj tagordoj iom imperiisme emas mallongigi per la vorto "ekspansio". Temas ne pri provo konkeri la landajn teritoriojn por la Centra Oficejo, sed temas pri klopodo disvastigi la bazon de la Asocio, la organizan bazon, pere de novaj oficejoj, kiuj ekspluatas — en la plej bona senco, espereble — en diversaj landoj la tie disponeblajn kondiĉojn kaj la tie troveblajn homajn fortojn.



Novaj vojoj de la Asocio: D-ro Victor Sadler, ĝenerala direktoro de UEA, parolas en la Malfermo de la 66a UK

Tiu nova evoluo de nia organizaĵo komenciĝis efektive tre proksime de la Centra Oficejo, en Antverpeno (Belgio), kaj komenciĝis (kiel laŭ mia starpunkto ĉiuj bonaj organizaj evoluoj komenciĝas) per praktika bezono. La Grafika Centro, kiun ni fondis antaŭ ne longe en Antverpeno, komenciĝis en subtegmenta ĉambro de privata domo per unu volontulo, kiu deziris kaj pretis fari kompostlaborojn por helpi la Centran Oficejon. El tio kreskis io, kio hodiaŭ laborigas profesie plurajn personojn kaj ankoraŭ plurajn aliajn volontulojn, kio hodiaŭ disponas pri multekosta aparataro, maŝinaro, kaj instaliĝas en la venontaj monatoj en alia domo en Antverpeno apartenanta al Instituto Hodler. Tiu efektive rapidega evoluo en Antverpeno sukcesis jam grandparte, preskaŭ komplete, malŝarĝi la Centran Oficejon de la grafikaj laboroj, kiujn ĝi faris en la antaŭaj jaroj. Praktike ĉiuj niaj malgrandaj presaĵoj estas nun prilaborataj en Antverpeno, kaj tie oni ĉiam pli transprenas pli ambiciajn laborojn. Vi, el kiuj la plimulto verŝajne loĝas en Sud-Ameriko, eble kun plezuro rimarkis — mi esperas tion —, ke en la lastaj

monatoj la revuo *Esperanto* finfine atingas vin iom pli rapide kaj per efektiva aerpoŝto el, ne Nederlando nek Britujo, sed nun Belgio. Kaj ankaŭ tio estas ebla nur dank' al la fakto, ke ni fondis tie tiun Grafikan Centron, kiu transprenis nun ankaŭ la ekspedlaborojn por nia revuo kaj ebligis al ni ne nur utiligi la volontulan laborforton tie, sed ekspluati ankaŭ la relative favorajn belgajn aerpoŝtajn tarifojn.

Post tiu oficejo sekvis la fondo de aparta oficejo en Nov-Jorko por eksteraj rilatoj, precipe por la rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj. Ĝia laboro esence konsistas el informado al la delegaciaro de la ŝtatoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj. Tiu oficejo jam la duan jaron funkcias, kaj, kvankam ĝiaj rezultoj ne estas tiel mezureblaj en miloj da paperfolioj, kiel estas tiuj de la antverpena oficejo (kvankam ankaŭ ĝi ja en Nov-Jorko produktas amason da papero), tamen, jam sentiĝas ankaŭ ĝenerale en Usono efiko de tiu oficejo, ĉar la gazetaro multe pli vigle interesiĝas pri Esperanto lastatempe kaj pozitive raportas pri la lingvo, laŭ nia opinio dank' al la ekzisto de la Nov-Jorka Oficejo.

UEA ne plu estas identigebla kun Roterdamo

Trian oficejon ni fondis nur antaŭ tri-kvar monatoj en Budapeŝto, nome la Sciencan Eldonan Centron, kaj mi estas tre kontenta, ke ni havas ĉi tie inter la kongresanoj la gvidanton de tiu Centro, d-ro Ottó Haszpra. Kaj jam, kiel rezulto de ĝiaj unuaj preparlaboroj, troviĝas antaŭ la Estraro dum tiu ĉi Kongreso deko da proponoj, tute konkretaj kaj ellaboritaj, pri sciencaj eldonaĵoj, kies manuskriptoj estas aŭ jam tute pretaj aŭ en prilaboro. Ni kredas, ke per tiu oficejo kaj per la talentoj de budapeŝtaj sciencistoj-esperantistoj ni sukcesos krei ion, kio ege mankis ĝenerale en la Esperanta literaturo, nome scienc-teknikan literaturon, kaj ne nur tion, sed ankaŭ doni stimulon ĝenerale al la scienca agado en Esperanto, ekzemple, per helpo al la kunordigo de fakaj asocioj, de sciencaj renkontiĝoj k.s.

Do, iom post iom UEA ne plu estas identigita kun Roterdamo, sed UEA ankaŭ estas en Budapeŝto, UEA estas en Nov-Jorko, UEA estas en Antverpeno, kaj ni jam sentas, ke per tio ni ne nur sukcesas pligrandigi nian laborpotencialon, ne nur ekspluati ekzemple favorajn kondiĉojn por ŝtataj subvencioj en Belgio aŭ favorajn impostajn kondiĉojn en Usono, sed ke ni ankaŭ koncepte sukcesas ligi pli intime al UEA la esperantistojn en tiuj diversaj landoj kaj mondpartoj. Jam dum mia lasta vizito al Brazilo oni demandadis min, kiam UEA establos ankaŭ ĉi tie en Sud-Ameriko oficejon. Kaj oni povus demandi sin, ĉu ne estas jam sufiĉe da Esperanto-organizaĵoj ĉi tie. Ni ja scias, ke

jam nur en Brazilo ekzistas almenaŭ tri landaj asocioj. Sed estu tute klare, ke neniam en nia pensmaniero temas pri ia anstataŭigo de landaj asocioj, sed temas pri faka disbranĉigo de UEA: eldona agado kaj preslaboro en Belgio, scienc-teknika agado en Hungarujo, eksteraj rilatoj en Usono — kaj eble ni venos ankaŭ al la stadio trovi aparte konvenan, aparte taŭgan agadkampon, por kiu ĝuste iu sud-amerika lando (ĉu Brazilo, ĉu alia) estos la elektenda.

Malkateniĝo el la eŭropisma pensmaniero

Se paroli perspektive, ni en la nuna momento konsideras, ke oficejo por turisma agado estos verŝajne nia plej praktika kaj utila estonta paŝo. La potencialo de la Esperanto-movado pri turismo estas vere granda. Diversaj organizaĵoj, i.a. UEA, ĝis nun pli-malpli amato klopodas kunigi vojaĝgrupojn, ekspluati tiun turisman potencialon, anstataŭ simple lasi al neesperantistaj vojaĝoficejoj ĉion organizi. Sed tio vere ne sufiĉas, kiel ni mem spertis, kaj estas necese fondi iun konstantan oficejon, kiu povos internacie organizi karavanojn, ne nur al Universalaj Kongresoj sed ankaŭ, ekzemple, por stimuli ni diru la japanan jaran kongreson per iu vojaĝgrupo el Eŭropo, el Usono aŭ alia mondparto. Samtempe tia oficejo povus ludi la rolon de informcentro por neesperantistaj turismaj organizaĵoj kaj per tio do havi duflankan funkcion.

Do, tiom pri la ĝenerala organiza evoluo de la Asocio en la lastaj jaroj. Tion grandparte vi jam scias, sed mi kredas, ke la Movado ĝenerale ne sufiĉe konscias ankoraŭ, kiom revolucia estas tiu ĉi proceso en UEA. Dum jardekoj UEA konis nur unu centron, nur unu direktoron, kaj simple estis kvazaŭ psike ligita al tia pensmaniero, iel katenita. Mi vidas la evoluon, kiun ni travivis en la lastaj jaroj tiurilate, kiel malkateniĝon ne nur de tiu centrisma pensmaniero, sed ankaŭ de la eŭropisma pensmaniero, kaj tio estas multe pli grava.

Kiel ebligi tujan internacian komunikadon

Ni vivas nun en epoko, kiam vi povas eniri iun ajn oficejon de flugkompanio kaj mendi flugon, ni diru de Japanujo al Los Angeles, kaj tuj oni povos informi vin, ĉu estas libera loko en tiu flugo aŭ ne. La komunika revolucio ankoraŭ apenaŭ tuŝis la Esperanto-movadon. Tian tujan tutmondecon ni ankoraŭ bedaŭrinde ne spertas en nia Movado. Kaj estas necese, ke nia Asocio adaptiĝu al la teknologiaj progresoj. Tiurilate do mi volas ankaŭ paroli momenton pri la alia flanko de la lastatempa organiza evoluo, kaj tio estas la aŭtomatigo. Kiel vi eble scias, ni ĉi-jare aĉetis iom kapablan komputilon por la CO, kapablan ne nur por niaj nunaj bezonoj, sed ankaŭ kapablan por plivastigo kaj pliampleksigo. Ni estas nun en la stadio — kompreneble tre peno kaj laboriga — de adapto de nia tuta administrado al la moderna tekniko. Mi ne volas tedi vin per la detaloj de tiuj adaptoj, sed nur doni al vi unu tute etan sed tamen senteban ekzemplon: ni intencas aboli

la kongresnumerojn, kiujn vi tiel kutimiĝis tra la jardekoj parkeri kaj porti sur viaj brustoj. La estonta administra sistemo de UEA konos nur unu kodon por ĉiu esperantisto (ĉu membro, ĉu ne), kiu estos ŝame rekonilo, ĉu por kongresaneco, ĉu por konto ĉe UEA, ĉu por iu alia kategorio en la Movado. Do, eble, se vi aliĝos al la Antverpena Kongreso, vi jam surpriziĝos ne ricevi kongresnumeron sed iun kodon.

Sed, kio estas grava, kaj kion mi aludis per la ekzemplo de la flugkompanioj, ne estas tio, ĉu vi havas numeron aŭ vi havas literan kodon aŭ ion similan, sed la grava estas, ke ni adaptiĝas al la epoko de tuja internacia komunikado. Ni antaŭvidu, ekzemple, ke UEA povos havi libroprovizejojn en Sud-Ameriko, en Orienta Azio, kaj tamen administri ĉion centre, same kiel iu flugkompanio centre administras ĉiujn siajn flugojn tra la mondo, kaj tamen havas centrojn en aliaj lokoj, kiuj estas same bone informitaj en iu ajn momento pri la stato de tiuj flugoj. Kaj, se vi pripensas, ke nun iu brazilano, kiu ĉi tie volas mendi librojn el Roterdamo, devas meze atendi kvar monatojn ĝis la libroj alvenas — eĉ se ni tuj liveras, eĉ se ni tuj plenumas la mendon — kaj ankoraŭ devas barakti kun la doganejo, vi vidas, ke ni estas fakte apenaŭ superintaj la epokon de la velŝipoj kaj la ĉevala poŝto.

Belaj revoj de hodiaŭ venontjare estos realo

Diversaj evoluoj estas jam realigeblaj. Ni esperas, ekzemple, jam en la venonta jaro komposti la Jarlibron de UEA en nia Antverpena Centro per nova fotokompostilo (kiun ni ĵus aĉetis), kiu povos ricevi la informojn de nia komputilo en Roterdamo en simpla formo magneta kaj aŭtomate transpreni ĉiujn detalojn pri la adresoj de la delegitoj ktp. Tiel, la preparlaboro de la Jarlibro — kiu nun daŭras plurajn monatojn — povos espereble esti reduktita al tute mallonga periodo. Kiam mi diras, ke ni povus havi administradon de la Libroservo en unu centro, kaj tamen scii en ĉiu momento, kiom da ekzempleroj de *Plena analiza gramatiko* kuŝas en nia stokejo en Tokio kaj kiom kuŝas en nia stokejo en Brazilio, kaj tuj sendi ekspedinstrukciojn al tiuj lokaj ekspedocentroj, ekzemple, tio estas ankoraŭ ne la nuna stato, sed ni ne trompu nin, tio estas realaĵo de morgaŭ.

La teknika evoluo iras nun tiel rapide, ke tio, kio hodiaŭ ŝajnas nur nova bela revo, fakte venontjare estos realo. Kaj, kiam mi diris, ke finiĝas la centrisma periodo de UEA kaj finiĝas ankaŭ la eŭropcentra periodo de UEA, mi pensas ne nur pri tiuj novaj oficejoj, kiujn ni fondis en diversaj mondpartoj kaj fondos ankoraŭ, sed ankaŭ pri tiu ŝanĝo, kiun la teknika evoluo portas ne nur al la neesperantista mondo, sed finfine ankaŭ al la esperantista mondo. Ni iom post iom estos tiel tuje kaj vaste interligitaj interkontinente, ke vere ne plu havos sencon demandi sin, kiu kontinento estas la centro de nia Movado, ĉar ni ja estos, kiel ni devus esti, egalaj.

Victor Sadler

Generaciaj aspektoj de la Esperanto-movado

La 66a Universala Kongreso en Brazilio estis iom akcentite juna. Ĝi kolektis multe pli da gejunuloj ol la TEJO-kongreso en Meksikio, multoble pli ol venis al pluraj Universalaj Kongresoj dum la pasintaj jaroj. Aliflanke, la 67a UK, fine de julio 1982 en Antverpeno (Belgio), supozeble estos denove tipa rilate la generaciajn aspektojn de la Movado en Eŭropo. Sonas tial tre trafe, ke la Kongreso en Antverpeno traktos tiun demandon, kiun la Movado frontas ne malpli serioze ol la tuta hodiaŭa mondo. La sekva teksto provas jam nun, antaŭkongrese, lanĉi diskuton pri la generaciaj problemoj en la Esperanto-movado.

EN 1982, Unuiĝintaj Nacioj okazigos Asembleon pri Pli Aĝaj Personoj. Pro progreso en medicino kaj en la fizikaj vivkondiĉoj en multaj landoj, la meza vivolongo daŭre altiĝas, kaj estas ĉiam pli kaj pli da aĝaj personoj inter la loĝantoj de tiuj landoj. Samtempe la aĝo por emeritiĝo falis en multaj landoj kaj profesioj.

La nombro de maljunuloj en la evoluintaj landoj kaŭzas streĉojn, kaj necesigas adaptiĝojn, en la ekonomia, politika kaj socia strukturoj de tiuj landoj. Inter alie, kreiĝis granda grupo da homoj, kiuj havas je sia dispono liberan tempon. Kiel utiligi tiun tempon plej



La internacia Esperanto-movado ne estas tia "veterana klubo", kia ĝi ofte ŝajnas en la Universalaj Kongresoj.

efike por la individuo kaj por la socio? Kiel kontentigi la bezonojn de tiuj aĝogrupeoj? Tiu kreskanta tavolo de la civitanaro konsistigas ankaŭ grandan voĉdonpovon kaj estas ĉiam pli grava elemento en la balotado.

La Esperanto-movado ne estas imuna al tiu ĝenerala demografia ŝanĝiĝo. Ankaŭ ĝi havas sian grandan nombron da pli aĝaj personoj. Parte ilia ekzisto rezultas el simplaj demografiaj faktoroj, sed parte ĝi estas atribuebla al malsukceso adekvate renovigi la Esperanto-asociojn en kelkaj landoj. Leviĝas el tiuj konstatoj serio da esencaj demandoj. Unue, kiel Esperanto povas efike servi tiun maljunularon supre aluditan? Ĉu ĝuste tiuj emeritaj personoj, kiuj havas je sia dispono tempon kaj deziras esti socie utilaj, ne povus trovi en Esperanto valoran kaj liberigan ilon por vastigi siajn horizontojn kaj malfermi al si la mondon?

Due, kiel la Esperanto-movado povas mem reagi al la ŝajna malsukceso renovigi la pli junajn tavolojn en certaj landoj kun iam forta Esperanto-movado? Ĉu tio rezultas el manko de junaj lernantoj de la lingvo? Ĉu ĝi rezultas el tio, ke pli junaj personoj, post ellerno de la lingvo, ne povas aŭ ne emas trovi sian rolon en la ekzistantaj Esperanto-organizaĵoj? Ĉu la organizaĵoj mem adaptiĝas adekvate al la ŝanĝiĝantaj sociaj cirkonstancoj kaj trovas vojon por demokrate transdoni la povon de generacio al generacio? Kian rolon ludas la lokaj grupoj en tiu procezo?

La jaro 1985 estas deklarita de Unuiĝintaj Nacioj la Jaro de la Junularo. La nuna kongresa temo ebligas prepari la partoprenon de la Esperanto-movado en la agado ligita al la Jaro de la Junularo. Se en certaj landoj la nombro de aĝaj personoj daŭre kreskas, la proporcio de maljunuloj en tiuj landoj emas kreski eĉ pli rapide, ĉar la proporcio de junuloj ĉiukaze falas. En Svedio, ekzemple, la meza vivolongo estas nun 77,9 jaroj por virinoj kaj 72,7 jaroj por viroj. Dum tiuj ciferoj estas inter la plej altaj en la mondo (en Etiopio temas pri 40,6 kaj 37,5), Svedio havas unu el la plej malaltaj naskoproporcioj en la mondo. Tiu falo en la nombro de naskoj kaŭzas grandajn problemojn en la klerigaj sistemoj en la diversaj industriaj landoj. En pli mallonga perspektivo, nuntempaj ekonomiaj malfacilaĵoj tamen metas grandan nombron da junaj homoj inter la senlaborulojn kaj kondukas al senesperigo kaj malkontento.

La naskoproporcio en Etiopio estas 450 procentojn pli alta ol tiu de Svedio. En la evoluantaj landoj, precipe tiuj de Afriko, la nombro de gejunuloj estas proporcie ege granda kaj streĉas la malmultajn rimedojn de tiuj landoj ĝis apenaŭ eltenebla nivelo. Oni povas antaŭvidi, ke la proporcio de gejunuloj en la evoluantaj landoj daŭre kreskos en komparo kun tiu de la industriaj landoj.

Kian rolon Esperanto povas ludi en la klerigo de junaj homoj? Ĉu ĝi povas alporti sian kontribuon precipe en la edukado de teknikistoj kaj kleruloj por la ekonomia progreso de la Tria Mondo? Ĉu ĝi povas malfermi perspektivojn por la gejunuloj en la industriaj landoj? En mondo kies internaciaj rilatoj fariĝas ĉiam pli

intensaj, dank' al la progreso interalie de la komunika teknologio, ĉu Esperanto povas eduki la junajn civitanojn al pli taŭgaj mondkonceptoj kaj malfermiteco al mondaj perspektivoj?

Interne de la Esperanto-movado mem, la rolo de la junularo estas tre esenca. Ofte, tamen, oni ne sukcesas trovi por ĝi taŭgajn organizajn formojn, kaj, se gejunuloj multnombre lernas Esperanton, la plimulto aŭ neniam aktivas en la Esperanto-movado aŭ pasiviĝas pro karierasangoj, studaj bezonoj aŭ novaj familiaj devoj. Ĉu eblas trovi formojn por pli efike mobilizi tiujn fortojn? Kaj, kiel plej efike transponti la transiron el la junularaj al la ĝeneralaj Esperanto-organizaĵoj?

Tiu lasta demando rekte rilatas al problemoj ankaŭ de la mezaj generacioj. Se oni rigardas Esperanto-kongreson aŭ alian aranĝon, aŭ se oni analizas la agadon en la Esperanto-movado, oni facile ricevas la impreson, ke la Movado konsistas el dupolusa partoprenantaro. Mankas iagrade la mezaj aĝoj. Ĉu tia supozo estas realaĵo? Kiel plej bone teni la intereson kaj partoprenon de mezaĝaj homoj? Kiel enpreni efike en la Esperanto-agadon familiojn, kaj homojn en mezo de profesia kariero?

Kaj, fine, kiel kreskigi la reciprokan respekton kaj kunlaboron inter la generacioj, ĉu ene de, ĉu ekster la Esperanto-movado?

Humphrey Tonkin

RENKONTIĜO DE ĈINAJ ESPERANTISTOJ:

Vera erupto ankoraŭ venos

DE LA 25a ĝis la 31a de julio, do samdate kun la 66a UK en Brazilio, okazis, preskaŭ ĝuste antipode de la brazila ĉefurbo, en Huangshi kaj Lushan-monto renkontiĝo de ĉ. 300 ĉinaj geesperantistoj. Kvankam ambaŭ lokoj de la renkontiĝo situas ĉe borde de la fama rivero Yangzi, la unua apartenas al la provinco Hubei, la dua al Jiangxi. Temas pri la plej granda renkontiĝo, kunveno aŭ kunloĝado en la tuta historio de la ĉina Movado, ekde la penetro de la lingvo en la landon, sojle de la nuna jarcento.

El ĉiuj 30 provincoj, metropoloj kaj aŭtonomaj regionoj mankis reprezentantoj nur de kvar. Sole du el tiuj kvar — aŭtonomaj regionoj de Tibeto kaj Ningxia — ne havis eĉ sinanoncintojn. Pluraj provincoj sendis oficialan delegacion. Alvenis rektoro de universitato, partia sekretario, profesoroj, lektoroj, ĉefkuracistoj kaj inĝenieroj, sed plejpartis junaj laboristoj, studentoj kaj oficistoj. Aĝe la aliĝintoj diferencis de 4 ĝis 78 jaroj. Tiuj faktoj eble sufiĉas por indiki, kian disvastigon la ĉina Movado atingas en la nuna stadio. Okazis interkona kunveno, konferenco pri la ĉina E-movado, prelegoj pri esperantologio kaj interlingvistiko kaj diversaj kunsidoj (instruistoj, sciencistoj, gejunuloj, membroj de UEA ktp.). Ĉiuj emociiĝis pro la intima, agrabla kaj harmonia etoso, kiu kulminis dum amuza programo, posttagmeze la 26an de julio: Sur la podio ĥoris "La Esperon" membroj de UEA, ĈEL kaj tiuj, kiuj eklernis Esperanton antaŭ 1957. La tuta luksa salonego, kien enpuŝiĝis ankaŭ svarmoj da neesperantistoj, ekstaris spontane por aliĝi al la kantado. En multaj okuloj ekbrilis larmoj, eble pro impresoj neniam antaŭe spertita.

La trian tagon preskaŭ la tuta kongresanaro ŝipas al Lushan-monto, fama ĉina somera pitoreskaĵo, kaj kunfandiĝas kun aliaj grupoj de esperantistoj, kiuj jam atendas tie, por daŭrigi la kongreson. Sume pli ol 400 geesperantistoj skuis dum kelkaj tagoj tiun pitoreskan

regionon (kun 30 000 turistoj ĉiutage) per esperantlingvaj babiladoj, afiŝoj, sloganoj, gaja subĉiela amuziĝo. La organizantoj de la Renkontiĝo, spite al ekstrema okupiteco, ne povis ne kontentigi la ege interesitan publikon per prelego pri la Internacia Lingvo.

Dum la debatoj, multaj emfazis, ke la ĉina Esperantomovado devas disvolviĝi vasten kaj profunden. La nuna revigliĝo, ekde 1978, estas nur antaŭtremeto de la "vulkana erupto", pri kiu la aŭtoro de ĉi tiuj linioj jam aludis en nia revuo de februaro 1979. Krom multaj kursoj dissemiĝis tra la tuta lando, funkcias nun du korespondaj lernejoj de Esperanto. Unu el ili, Xinhua, jam ĝis la 7a de marto ĉi-jare havis 29 466 gelernantojn. Tiuj estas elektitaj el 150 000 sinanoncintoj. Oni opinias, ke necesas plie disvastigi la lingvon, necesas altigi la lingvan nivelon, necesas etendi la Movadon ankaŭ al la fakaj, precipe scientechnikaj kampoj. Oni serioze konsideras la eblecojn por starigi ĉinajn sekciojn de ISAE (sciencistoj), TEJO (junularo) kaj ILEI (instruistoj).

Kvankam la Renkontiĝo montriĝis iom senorda el la organiza vidpunkto, ĉefe pro spertomanko, plejparto de la kunloĝantoj restas treege kontenta kaj estas "nesaveble infektita" de la Esperanta etoso. Multaj ĵuras fariĝi dumviva esperantisto. Ĉiuj esperas, ke la Renkontiĝo de Ĉinaj Esperantistoj de nun okazu ĉiujare, same kiel en multaj movade fortaj landoj.

Ikso

Ĉina reeĥo de la 66a UK

LA 22an de aŭgusto, Ĉina Esperanto-Ligo aranĝis raportokunvenon pri la 66a UK, kiu altiris ĉirkaŭ 200 pekinajn esperantistojn. Unue parolis s-ro Chen Yuan, fama lingvisto kaj vicprezidanto de ĈEL. Li koncize konigis la belan kongresurbon Brazilio, la ĝeneralajn aspektojn de la Kongreso kaj kontaktojn de la ĉina delegacio kun alilandaj esperantistoj. Inter alie, li menciis eblecon okazigi UK en Ĉinio, dirante: "Esperanto estas internacia helpa komunikilo, ĝi devas havi universalecon. Se nur eŭropanoj uzus la lingvon, do, la lingvo perdus sian universalecon. Nur



Pekinanoj atentis la raporton pri Brazilio: La enlandan revigligon akompanas intereso pri la internacia Movado.

se UK okazos en Azio tiel ofte, kiel en Eŭropo, oni povos nomi Esperanton efika internacia helpa lingvo." Poste s-ro Zhang Qicheng, ĝenerala sekretario de ĈEL kaj komitatano de UEA, detale raportis pri la Kongreso kaj la aktiveco de la delegacio. Lin profunde impresis tio, ke en la Kongreso troviĝis multaj gejunuloj de Latin-Ameriko flue parolantaj Esperanton. La finon de la kunveno kronis aŭdigo de prelegoj, paroladoj kaj E-kantoj surbendigitaj en la Kongreso.

Estas aparte menciinde, ke la ĉina novaĵagentejo Xinhua, "Popola ĵurnalo" kaj "Luma ĵurnalo" publikigis informojn pri la inaŭguro kaj fermo de la Kongreso, la kongresa temo kaj elekto de la fama ĉina verkisto Bakin kiel membro de la Honora Patrona Komitato de UEA.

PUBLIKA KUNSIDO DE LA AKADEMIO:

Valora kaj ripetinda

En la kadro de la 66a UK okazis publika kunsido de la Akademio de Esperanto, unuafoje post multaj jaroj. La temo estis "La rolo de la Akademio". Ĉeestis la prezidanto de la Akademio, William Auld, akademianoj Baldur Ragnarsson, Werner Bormann kaj Geraldo Mattos, kaj proksimume 120 kongresanoj. La prezidanto enkondukis per 20-minuta prelego pri funkcioj, taskoj kaj laboroj de la Akademio. Dum la posta diskuto intervenis, krom la akademianoj, 11 kongresanoj. Post la kutima anatemo de neologismoj, sen kiu verŝajne neniu kunveno estus kompleta, oni revenis al la ĝusta temo, diskutante la "sendependecon" de la Akademio, ĝiajn taskojn, konsiston, proceduron. Ĉu la Akademio estas nesufiĉe agema, aŭ ĉu prefere ĝi evitu riski troimpetemajn elpaŝojn? Ĉu nur homoj ĉiutage parolantaj Esperanton estu alektataj? Kiel la Akademio helpu unuecigi la lingvouzadon? Tiaj estis kelkaj diskutpunktoj. La nivelo de la intervenoj estis ĝenerale serioza kaj atentinda. En la fino la prezidanto opiniis, ke la kunsido estis valora kaj eventuale ripetinda iam estontece.

RENKONTIĜO DE ESPERANTAJ FAMILIOJ:

Grandega stimulo por infanoj

SE VI HAVAS infanojn, denaskajn Esperanto-parolantojn, ne preteratentu REF-on (Renkontiĝon de Esperantaj Familioj). Kvankam okazinta nur trifoje, ĝi jam estas aranĝo gravega por Esperanto-familioj. Kaj konsideru la fakton, ke ĝi estas io tute alia ol la Infanaj Kongresetoj. Nome, en REF ĉio estas planita por la infanoj, kaj kun ili konstante estas ankaŭ la gepatroj, dum la Infanaj Kongresetoj ĉefe servas por prizorgi la infanojn dum la gepatroj ĉeestas en la programoj de Universalaj Kongresoj. Do, la infanoj havas infanan renkontiĝon, sed kun propraj gepatroj kiel prizorgantoj. En la ĉi-jara REF, okazinta inter la 14a kaj 22a de aŭgusto en la slovaka urbo Žilina, partoprenis naŭ familioj, kun 15 infanoj kaj 14 gepatroj, el Hungario, Pollando, Jugoslavio, Ĉeĥoslovakio kaj FR Germanio. La programo estis tre riĉa (pluraj ekskursoj ekz.) sed ankaŭ specifa (desegno-horoj, kanto-horoj, ludoj internaciaj, aranĝo de propra infana kulturprogramo, parkludoj ktp.). Ankaŭ la gepatroj havis sian programon. Oni povis aŭdi kompetentajn kaj interesajn prelegojn pri denaskismo, sintaksa

NOVAĴO EN LA BELARTAJ KONKURSOJ:

Infanlibro de la Jaro

DUM la pasintaj tri jaroj, ekde la Internacia Jaro de la Infano, la Belartaj Konkursoj de UEA inkluzivis ankaŭ la branĉon de porinfana literaturo. Escepte de la komenca jaro 1979, la partopreno en ĉi tiu konkursa branĉo estis tiel minimuma, ke nun la Estraro de UEA decidis, ke la eksperimento ne pravigas ĝian definitivan enkadrigon en la Konkursoj. Anstataŭe, la Estraro decidis dediĉi novan premion al la porinfana literaturo. Ekde 1982, eksperimente por la venontaj tri jaroj, la Juĝkomisiono de la Belartaj Konkursoj decidis pri unu premio, kiu iros al tiu infanlibro, kiu enhave kaj aspekte estos la plej elstara. Povas konkursi ĉiuj Esperantaj infanlibroj eldonitaj en la antaŭa kalendara jaro. Finance, la premio egalvaloros la kutimajn unuan, duan kaj trian premiojn de la Belartaj Konkursoj, kio en 1982 sumiĝos al 525,00 guldenoj. La premio iros al la koncerna eldonejo. Kompreneble, se mankos taŭgaj kandidatoj, la Juĝkomisiono rajtas decidi ne aljuĝi la premion por difinita jaro. La limdato por fari proponojn estas la 31a de marto 1982. Ĝis tiam, al la adreso de la Centra Oficejo de UEA alvenu po tri specimenoj de la proponata infanlibro, kun klara indiko "Infanlibra konkurso". La Oficejo plusendos la specimenojn al la Juĝkomisiono kaj ili do ne estos resendblaj al la proponintoj.



evoluo de dulingvaj infanoj, intonacio en Esperanto, kaj instruado de Esperanto laŭ aŭdvida metodo.

Sed, ĉefe, la infanoj ĉiam estis kune, amikiĝis, ludis kaj ĝuis. Por la malpli grandaj infanoj (kaj ĉefe estis tiaj: 4–7-jaraj), kiuj malofte havas la okazon uzi Esperanton, tio estas gravega stimulo. Por la gepatroj bona lernejo, ĉar oni mem multon lernis unuj de la aliaj. La lingva nivelo de ĉiuj infanoj (krom de unu familio) estis maksimuma, ja ĉiuj estis denaskuloj.

Oni decidis, ke la sekva REF okazu en Hungario (ĉe Balatono), kaj la postsekva en Jugoslavio. Plej grandan dankon oni ŝuldas speciale al familio Csiszar el Várpalota, kiu sinofere, sen esti oficiala organizanto, plenumis praktike ĉiujn organizajn laborojn kaj transprenis la taskon aranĝi la sekvan renkontiĝon.

Zlatko Tišljär

FAKA AGADO:

Esperanto en muzeologia terminaro

NUNTEMPE en Budapeŝto, Hungario, grupo da specialistoj laboras super fakterminaro por relative nova sciencobranĉo — la muzeologio. Ĝi estas detale difinebla jene: la studo pri la historio, organizo kaj socia rolo de muzeoj, kaj la metodologio por kolekti, konservi, klasifiki kaj ekspozicii objektojn kaj dokumentojn havantajn daŭran estetikan, historian aŭ scian intereson aŭ valoron. Tiuj agadoj kutime estas plenumataj en diversstipaj muzeoj fare de muzeologoj, kiuj estas fakuloj universitate edukitaj kiel arthistoriistoj, antropologoj, arkeologoj, etnologoj, historiistoj, natursciencistoj, arkivistoj k.a. Reliefigenda estas ankaŭ la didaktika funkcio de muzeoj, kies ekspozicioj, prelegoj, eldonaĵoj kaj aliaj servoj de publikkleriga karaktero apartenas al la sfero de la muzeologio.

Malgraŭ ke la muzeologio estas relative nova scienco, ĝi jam havas sian propran terminaron, uzatan de ĉiuj profesiuloj okupiĝantaj teorie kaj praktike pri la

plurflanka laboro de muzeoj. Por antaŭenigi la disvolvon de terminologia normigo sur ĉiuj terenoj de la muzeologio kaj en ĉiuj landoj, en 1977 la Ĝenerala Konferenco de Internacia Konsilio de Muzeoj (ICOM), organizaĵo sub aŭspicioj de Unesko, rezoluciis, ke plurlingva terminaro estu kompilita. La celoj de tiu ĉi vortaro estas helpi muzeajn fakulojn en ilia ĉiutaga laboro, ebligi al ili la legadon kaj uzon de dokumentoj kaj artikoloj en fremdaj lingvoj, kaj faciligi la taskojn de interpretistoj kaj tradukistoj. Muzea Centrejo por Konservado kaj Metodologio, situanta en Budapeŝto, entreprenis la redaktadon de la verko en la kadro de la Terminologia Laborgrupo de Internacia Komitato por Dokumentado (CIDOC) de ICOM kaj kun internacia kunlaboro.

La unuaj du proveldonoj de la muzeologia vortaro, havanta la latinan titolon *Dictionary Museumologicum* (Muzeologia vortaro), aperis en 1978 kaj 1979. Ĵus eldonita en 1981 estas la tria provizora eldono kun terminoj en kvin lingvoj: la germana, angla, franca, hispana kaj rusa. La redakcio deziras pretigi la vortaron por definitiva eldono en 1983. En ĝi troviĝos ekvivalentoj de la terminoj en dudek lingvoj.

Tibor Sekelj, muzea fakulo el Jugoslavio, proponis, ke Esperanto estu inkludita en *Dictionary Museumologicum*, kaj István Éri, la prezidanto de la Terminologia Laborgrupo, konsentis. Provizora terminaro en Esperanto jam estis kompilita de Tibor Sekelj, kaj mi nuntempe okupiĝas pri ĝia reviziado. Laŭ la labormetodo de la redakcio de la muzeologia vortaro, la germana estas la fontlingvo, kaj ekvivalentaj vortoj kaj esprimoj en aliaj lingvoj estas listigitaj apud la responda germana termino. La Esperanta materialo bezonas specialan traktadon, ĉar, difference de la etnaj lingvoj uzataj en la vortaro, ne ekzistas muzeologia fakliteraturo en la Internacia Lingvo. Oni, do, ne povas bazi la elekton de terminoj sur la uzado en skribaj verkoj. Se en la etnaj lingvoj estas ĝenerala akordo pri la formo kaj signifo de termino, estas relative facile trovi la ĝustan ekvivalenton en Esperanto. Male, kiam ĉiuj lingvoj malakordas, eĉ la sama lingvo en diversaj landoj, ekzemple la germana en la du Germanioj, Aŭstrio kaj Svislando, estas necese elpensi terminon. Pro la granda fleksebleco de Esperanto, tio ne prezentas nesupereblan obstaklon.

Espereble la provizora Esperanta terminaro estos publikigita ĉi-jare, kaj muzeologiaj kolegoj sciantaj la Internacian Lingvon povos doni sian opinion pri la trafeco de la vortoj kaj esprimoj en Esperanto. La *Jarlibro* de UEA por 1981 listigas nur tri fakdelegitojn pri muzeoj, sed certe estas pli da esperantistoj dise en la mondo, kiuj okupiĝas pri muzeologiaj aferoj. Se ili deziras kunlabori por la kompilado de la definitiva Esperanta parto de *Dictionary Museumologicum*, ili skribu al la sekva adreso, proponante sian helpon: Redakcio de *Dictionary Museumologicum*, Terminologia Laborgrupo de CIDOC, Múzeumi Restaurátor — és Módszertani Központ, Pf. 54, H-1476 Budapest 100, Hungario.

Bernard Golden

Revizora raporto

LA SUBSKRIBINTOJ, nomitaj de la Komitato por revizii la librotendon kaj la administran laboron, plenumis sian taskon rilate al la jaro 1980 en la 2a de julio 1981. Okaze de la kontrolo ili ricevis ĉiajn informojn de d-ro Sadler, kiu samtempe montris la dokumentojn. Ili enrigardis plurajn kontojn de la librotendo kaj speciale atentis pri la diversaj kontoj de la fondaĵoj, rigardante la evoluojn ekde la saldoj de la fino de 1979 ĝis la fino de 1980. Krome ili aparte kontrolis enskribojn de fakturoj en de ili elektitaj kontoj. Ili donis atenton al la listoj de debitoroj kaj kreditoroj, kiel ankaŭ al tiu de pagotaj kostoj, ĉiuj rilate al la fino de 1980. Farante tion, ili rimarkis, ke ekzistas ankoraŭ ne-fintraktitaj kontoj pri la en 1967 okazinta Universala Kongreso en Tel Aviv, kaj ili opinias dezirinda fintrakti ilin.

La subskribintoj atentigas, ke en la librotendo, konforme al decido de la Estraro, la duobligo de la kompenso el la kapitalo de la Dumvivaj Membroj estas realigita, kvankam tiu duobligo nur ekde 1981 estas aprobita de la Komitato.*

La subskribintoj ne jam ricevis raportojn de reviziado de la Grafika Centro Antverpeno kaj de la UEA-

* Intertempe, la Komitato aprobis tiun duobligon de la kompenso ankaŭ por la jaro 1980. Cetere, la Komitato en Brazilio aprobis ankaŭ la aliajn financajn raportojn pri la jaro 1980.

Oficejo en Novjorko, kvankam ilia pasintjara tiurilata rekomendo estis akceptita en la komitat-kunsido en Stokholmo.

La kontojn de la Kongreso en Stokholmo la subskribintoj ne kontrolis, ĉar tiuj kontoj estas ne ankoraŭ fintraktitaj.

Tradicie la raporton de la komitataj revizoroj antaŭiras tiu de la profesia revizoro. Bedaŭrinde, la subskribintoj devis konstati, ke profesia reviziado ne jam okazis.

En la Komisiono pri Financo kaj Administrado, de kiu ambaŭ subskribintoj estas membroj, regule estas pri-traktataj la dumjaraj evoluoj de la financoj kaj administrado en la Centra Oficejo kaj en la Grafika Centro Antverpeno.

Dum ilia laboro la subskribintoj trovis neniun mankon aŭ neregulaĵon en la kontrolitaj kontoj kaj dokumentoj. Sekve de la supre priskribitaj faktoj la subskribintoj rekomendas al la Komitato akcepti — kun danko al la ĝenerala direktoro, d-ro Sadler — la kontojn de UEA pri la jaro 1980, escepte de tiu de la Universala Kongreso 1980, sub jenaj kondiĉoj:

- 1) ke ankoraŭ okazu reviziado de la administrado de la oficejoj en Antverpeno kaj Novjorko;
- 2) ke ankoraŭ raporto de profesia revizoro de la kontoj en la Centra Oficejo montru ankaŭ neniun neregulaĵon.

E.J. Woessink
T. Boersma



SESDEK JAROJ DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA (SAT): Tiu grava datreveno estis markita dum la 54a Kongreso de SAT, inter la 1-a kaj 8a de aŭgusto ĉi-jare, en Bazelo (Svislando). Al la Kongreso venis ĉ. 300 geesperantistoj el 16 landoj. Multo okazis dum la sesdek jaroj pasintaj ekde la fondiĝo de SAT en 1921 (dum la 13a Universala Kongreso en Prago). SAT en tiuj ses jardekoj konis ankaŭ tiajn atingojn, kia estis la membronombro de 6 500 en 1929 aŭ 5 000 en 1948. Ankaŭ al la SAT-kongresoj iam venadis pli da homoj, ekz. 1 200 en Amsterdamo (1948). Kvankam ĝiaj agadoj ne plu estas tiel dinamismaj kiel en la periodo inter la du mondmilitoj, SAT ankoraŭ sukcesas konservi la renomon de la dua plej grava internacia Esperanto-organizaĵo. Precipe ĝia eldona agado sukcesis en la pasintaj sesdek jaroj liveri al la Internacia Lingvo tiajn mejloŝtonajn verkojn, kiaj estas: "Plena vortaro", "Plena ilustrita vortaro", "Leteroj de Zamenhof" ktp. Iam antagonisme agorditaj, SAT kaj UEA jam de pluraj jaroj bone kunlaboras kaj respektas unu la alian. (Foto: J. Ošap)

Du enhavoriĉaj volumoj, kiuj instigas al debato

La internacia lingvo — sciencaj aspektoj. Redaktis Detlev Blanke. Berlin, Centra Laborrondo Esperanto, 1979. 237p. 21cm. Prezo 12,00 gld.

Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado. Redaktis Detlev Blanke. Budapest, Hungara Esperanto-Asocio, 1978. 228p. 19cm. ISBN 963 571 035 6. Prezo: 13,80 gld.

Du volumoj, recenzitaj ĉi tie kun ioma malfruo, viciĝas en la pli kaj pli ampleksiĝanta literaturo interlingvistika kaj esperantologia.

La internacia lingvo — sciencaj aspektoj proponas artikolojn de 14 aŭtoroj en tri ĉefaj partoj: **Internacia lingva komunikado kaj interlingvistiko**, **Scienca priskribo de Esperanto** kaj **Scienca apliko de Esperanto**. En la unua parto rimarkindas la artikoloj de Jerzy Leyk kaj Jaromír Jermář pri la konekso inter lingvo-sociologio kaj interlingvistiko, kaj de Árpád Rátkai, kiu, el marksisma vidpunkto, kontraŭbatalas la tezojn pri la "spontana eliminiĝo" de la lingvoj kaj pri la "transnacia lingvouza sistemo", kiun aliaj "marksistoj" — sed tion la aŭtoro ne diras klare — ankoraŭ defendas. La artikolo de Blanke pri "La Esperanto-movado kaj sciencaj esploroj" enhavas kelkajn diskutindajn asertojn. Ekzemple (p. 103), la sinteno de la esperantista movado, kun ties senduba "etburĝa aŭ sekteca karaktero" neniel malhelpis la sciencistojn okupiĝi pri Esperanto: la lingvofakuloj respondecas centprocente pri sia sinteno. Ĉu la moroj de kiu ajn gento malhelpas la lingvistojn interesiĝi pri ties lingvo? Same (p. 100), la principo "eliri el objektivaj historiaj procesoj" povas konduki al iluzio pri adaptiĝo de la Esperanto-movado al la regantaj tendencoj de la ĉirkaŭa socio. Mi dirus la samon pri iuj asertoj de Szerdahelyi (p. 114): lia priskribo de la esperantistaro estas ĝenerale ĝusta, sed tro subjektive prezentita. La "izoliĝo de la verda komunumo" for de la "establita mondo" (Szerdahelyi do atribuas al la "establita mondo" pozitivan valoron) ne estas celo, sed normala konduto de minoritata lingva komunumo. La koncepto "Esperanto estas la lingvo de tiuj, kiuj ĝin uzas", kritikata de Szerdahelyi, estas plene ĝusta, kaj precize pro tio Esperanto povas esti proponata al pli vasta publiko. La "ekzogena koncepto", predikata de la aŭtoro, enhavas kontraŭdiron, ĉar tiuj, kiuj simpatias al tiu koncepto ĝenerale ne sukcesas ĝin apliki (t.e. oficialigi la lingvon), dum la lingvo ekzistas kaj pluvivas nur dank' al la kavaliroj de la verda stelo. Ĉu iam kompetenta sociologo klarigos al tiuj, kiuj ankoraŭ ne komprenis tion empirie, kial la fiasko de Esperanto ĉe la "establita socio" dependas nek de la "stulteco de la esperantistoj" (tiun esprimon uzis fama eksfunkciulo de UEA dum pasintjara publika debato en Paderborn; Blanke

kaj Szerdahelyi diras preskaŭ la samon) nek de "antaŭjuĝoj" flanke de politikistoj, lingvistoj k.s., sed de profunda nekongruenco de la fenomeno (ni eĉ ne parolu pri "idealo") "Esperanto" kun la ĝisnuna "establita mondo"?


Rekomendinda estas la legado de la artikoloj de Blanke pri komparo de la vortfarado en Esperanto kaj en la germana lingvo kaj pri la motivado de la signifo de Esperantaj vortoj, kaj de J. Leyk pri la leksoformoj. La nocio "motivado", enkondukita de Blanke, devus montriĝi tre fruktodona por la esploro de la kunmetitaj vortoj kaj de la semantiko de Esperanto ĝenerale, sed lia prezento implicas adopton de la lama teorio pri la "gramatika karaktero". Ekzemple (p. 127), **plaĉa** estas analizita kiel **verbo + a** (kiel *gefäll/ig*), **faka** kiel **substantivo + a** (kiel *fach/lich*). Sed, ĉu **fama** aŭ **danĝera** (laŭ PIV, **fam** kaj **danĝer** estas substantivoj!) povus analiziĝi laŭ tiu ĉi teorio? Aliflanke, la komparoj de la p. 129, kiuj montras la diverĝojn inter Esperanto kaj la germana en la sufiksa sistemo, devus baziĝi sur semantika esploro de ambaŭ konstituantoj de la vortoj, ne sur nura atento al la sufiksoj. Se plie oni enkondukus la nocion de semantikaj paradigmoj, oni ne asertus, ke **buŝumo** ne estas analizebla (kp. **plandumo, kolumo**. . .).

Loko mankas, bedaŭrinde, por atentigi pli detale pri aliaj interesaj artikoloj, el kiuj mi tamen menciuj tiujn de S. Ĝuĝev pri fonologio kaj de P. String pri "Esperanto kiel objekto kaj instrumento de aŭtomata komputado".

En la tri ĉefaj partoj (**Historio, Ideaj fontoj kaj Perspektivoj**), la volumo *Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado* proponas studojn temantajn ĉefe pri la rilatoj inter la Esperanto-movado kaj la soveta socialismo. Á. Rátkai malfermas la dosieron de la Unua Internacio, sed el lia studo montriĝas, ke en tiu antaŭ-Esperanta epoko, aparte en la Kongresoj Ĝeneva kaj Lozana (1866-67), la prudonisma kaj bakuninisma tendencoj estis pli favoraj al la ideo de universala lingvo ol la marksanoj. Iom strange la aŭtoro strekas radikalan dividlinion inter la "teoria problemoj" de la universala lingvo kaj Esperanto: en alia artikolo, kies titolo bone montras la ĉefan ideon ("La internacilingva movado kiel kreinto de la Internacia Lingvo"), li montras la kontinuecon inter la Volapüka kaj Esperanta movadoj. Sed tiuj, kiuj adeptis al Volapük kaj al Esperanto estas ĝuste tiuj, kiuj pli frue opiniis gravega la "teorian" problemon de universala lingvo, dum la "realistoj" plu neglektis la realiĝintan utopion, t.e. Esperanton.

La jam antaŭe publikigita studo de S. Podkaminer metas — provizore? — finan punkton al la diverĝaj

opinioj pri la rilato de Lenin al Esperanto. Fakte ne gravas tiom la sinteno de unu homo — eĉ Lenin! — kiom la loko de la internacilingva problemo en la Tria Internacio: la punktoj "Pri Esperanto" kaj "Pri internacia lingvo" aperas (senrezulte) en la tagordoj de la 2a kaj 3a Kongresoj (1920-21) kaj poste malaperas. Kiel sciante — kaj aludite de Blanke en la artikolo pri la Internacio de Proleta Esperantistaro — la kulmina punkto de la favora situacio de Esperanto en USSR estis la Leningrada SAT-Kongreso de 1926. Pri tio, kio okazis poste, la koncerna libro informas tre neobjektive. Strange estas, ke oni reprenis la artikolon de U. Lins "Esperanto dum la Tria Regno", sed ne la



D-ro Detlev Blanke kaj unu el la de li redaktitaj libroj, kiujn metas sub la lupeon la ĉi-kuna teksto

tutan studon de la sama aŭtoro "Persekutoj kontraŭ la Internacia Lingvo" (publikigita en *Esperanto en perspektivo*), kiu pritraktas la sorton de la soveta Esperanto-movado en la jaroj 1937-39. La redaktisto kaj eldonisto de la libro tiel pretersilentas la plej terurajn batojn, kiujn suferis la Esperanto-movado (murdo de gvidantoj, deporto kaj pereigo de miloj da esperantistoj) malgraŭ la adaptiĝemo de la tiamaj gvidantoj de la soveta asocio, tre simila al la "samdirektigo" de la germana asocio. Tio ŝajne signifas, ke la respondeculoj de ĉi tiu eldonaĵo ne kapablis — malgraŭ la paso de la tempo, kiu ebligas sobran kaj senpartian prijuĝon — distanciĝi de la tiama stalinisma politiko, kaj tion konfirmas la artikolo de Blanke pri IPE, en kiu SAT estas denove kritikata pro ĝia "kontraŭsoveta" sinteno (ĉar Lanti kaj aliaj SAT-anoj komprenis jam en la jaroj '30 tion, kion naivuloj "eksciis" nur en 1956!) kaj IPE laŭdata ĉar "ĝi ĉion faris por informi la laboristojn pri la konstruado de socialismo en USSR", t.e. pro ĝia kontribuo al la mensogoj de la stalinisma propagando. La historio jam montris, kiu tiam pravis, kaj oni povus atendi de "marksistoj", ke ili kapablu fari memkritikon.

Polemikon povas veki ankaŭ la artikolo de Blanke dediĉita al la "interna ideo". Li prave rifuzas la tezon de la "spontana, aŭtomata aŭ memefika solidara funkcio" de Esperanto, per kiu Lapenna amplekse

retorikis, sed li ne solvas sufiĉe konvinke la kontraŭdiron inter la konstato, ke Esperanto estas ilo sen ideologio, kaj la fakto, ke la plej multaj esperantistoj estas ideologie kaj emocie "motivitaj", kaj ke ĝuste sen ili la lingvo simple ne ekzistus (same kiel ĝi ne ekzistus sen la homaranismo de Zamenhof). Por solvi la kontraŭdiron bezonatus iom pli da dialektiko: aserti sennuance, por kontraŭdiri la iom unuflankajn tezojn de Whorf, ke "lingvo estas nur ilo" malebligas sciencon aliron al la sociolingvaj problemoj. Tamen la aserto, ke "la tuta **mistika forto** de Esperanto kuŝas ne en la lingvo mem sed en la efiko de la komunikada proceso" estas ĝusta difino kaj la konkludoj de la p. 205 pri la ĝenerala ideologia tendenco de la esperantistaro estas tute pravaj.

Fine, la artikolo de M. Isajev "Pri bazaj metodologiaj problemoj de interlingvistiko", tre supraĵa, klopodas, kiel kutime, pravigi la sovetan prilingvan politikon. Lia konkludo sub formo de sloganoj: "estu la lingvoj naciaj, interpopolaj, mondaj, kaj ankaŭ la internacia helplingvo" (oni rimarku **ankaŭ** kaj **help-**!), similas al la proverba programo, laŭ kiu "la lup' estu sata kaj la ŝaf' netuŝata". Ĉ. Rátkai konvinke demonstris en la antaŭe recenzita libro, ke la transnacia lingvouza sistemo (kiu inkluzivas la "interpopolajn" kaj "mondajn" lingvojn ĉe Isajev) estas antagonisma kontraŭdiro kaj rabas de la socio la regpovon super la lingvo. M. Isajev, sub la formo de ideala harmonio, fakte pravigas la lingvan darvinismon, sed tute ne analizas la kaŭzojn kaj disvolviĝon de la lingvobataloj.

Ambaŭ libroj, enhavoriĉaj, plenaj je utilaj informoj, entenas ankaŭ mankojn kaj kritikindaĵojn, aparte pro partiecaj, dogmemaj tendencoj. Tamen, ju pli da tiaj studoj aperos, des pli povos disvolviĝi la grandaj debatoj pri la lingvo kaj la movado.

Michel Duc Goninaz (Francio)

Helpo de granda valoro

Esperanto-vortaro per temo-tabeloj, de Michele Mariano. Ascoli Piceno: Gabrielli, 1980. 12+142p. 30cm. Scienca eldonserio 1. Mimeo. Prezo: 26,40 gld. La du plej utilaj specoj de vortaroj estas tiuj, kiuj iras de la vorto al la signifo, kaj tiuj, kiuj iras inverse, de la signifo al la vorto. La unuaspecaj, la alfabetordaj, estas la plej ofte uzataj kaj per ili komenciĝis en ĉiuj lingvoj la leksikografia laboro. La duaspecajn oni kompilis nur poste, kaj ties oportunecon multaj personoj eĉ ne konjektas; tamen, kiom da fojoj "vorto ŝvebas al ni sur la lango": ni scias ja, ke ĝi ekzistas, sed la memoro ne tuj disponigas ĝin al ni; tiaokaze la rimedo estas ĝuste unu analogia, tem-ordigita vortaro.

Tiaj jam ekzistas en nia lingvo, sed nur skemaj, ekz-e la *Laŭtema E-franca vortareto* de prof. Duc Goninaz, kaj la ĵus provita *Duden-Bildvortaro* de R. Eichholz. Sed mankis ankoraŭ unu sistema prezento de ĉiuj nocioj, aranĝitaj tiamaniere, ke montriĝas la idoparenceco kun la tiel nomataj sinonimoj kaj antoni-

moj. Unu itala leksikografo, Michele Mariano, kiu pristudis tiun problemon de pli ol dek jaroj, jen donas al ni la unuan parton de sia giganta laboro. Mi ne povas ĉi tie detale priskribi tiun grandiozan kompilaĵon, de kiu la ekonomiaj kondiĉoj devigis la aŭtoron liveri nur eltiraĵon el gravaj sekcioj: Naturo, Kemio, Anatomio, Fizikaj kaj Psikaj Perturboj, Socia Kolektivo kaj Sentoj. Sed oni havos eble kelkan ideon ĉe nura cito de unu sola paĝo, dediĉita al la "sento": RIDI, ĉe kiu troveblas la terminoj:

ridi, satiro, sardona, sarkasmo, moki, pikema — ŝerci, malserioza, petoli, rikani, blagi, gajigisto, joviala, fola, bonhumorigi, karikaturo, travestii, parodii (mi ellasas la mal-vortojn)

kaj por ĉiu el ili la difinoj, pruntitaj el *PIV*.

Entute ĉi tiu unua ekstrakto enhavas ĉ. 5000 terminojn, tiele klasifikitajn kaj difinitajn, kaj krome, por plia oportuneco, alfabeto ordigitajn je la fino de la volumo. Ĉiuj verkistoj, tradukistoj aŭ simplaj literaturamatoroj trovos en la temvortaro de Mariano helpon de granda valoro. Kaj alia merito de ĉi tiu verkego estas, ke ĝin oni povas tuj adapti al iu ajn lingvo. Des pli ni devas danki s-ron Mariano, ke li unuapaŝe dediĉis sian talenton kaj persistecon al la realigo de ĝia Esperanta versio.

G. Waringhien (Francio)

Moroj kaj modoj

La fatomaŝino (1934) de Ĵan Kokto' (Jean Cocteau 1889-1963). El la franca trad. G. Lagrangé. Pizo: Edistudio, 1979. 125p. 21cm. Tespa 3. Prezo: 15,00 gld.

Francio, kiel konate, kapablas siastile digesti, kaj iel amortizi, ĉiujn revoluciojn kaj avangardojn de la eŭropa kulturo, en la plej diversaj kampoj; en Francio, renovigoj perdas sian metafizikan karakteron kaj frontas alternativon de evoluo: aŭ filtriĝi tra lucida analizemo, aŭ fariĝi temo por salona diskuto. Duakaze — evidente — revolucioj konservas sian ŝokan forton, sed perdas sian konkretan enhavon.

Legado de tiu ĉi teatraĵo de Cocteau estis por mi konfirmo de tiu ĝenerala tendenco de la franca kulturo, kiel sintezo de salonoj kaj avangardo. Jean Cocteau, polimorfa artisto, kies produktado enkalkulas teatraĵojn, filmojn, freskojn ktp., komence de la jarcento ludis rolon ne nur kiel kulturaganto, sed ankaŭ kiel socia histriono kaj protagonisto de gazetaj kronikoj. Liaj verkoj — ankaŭ la plej bonaj — parte spegulas lian emon al skandalo kaj al facila paradoksado, kun kuri-ozaĵ kaj foje interesaj efektoj pri la uzata lingvaĵo.

En *La fatomaŝino*, ekzemple, Cocteau traktas la eternan miton de Edipo, kiun la leganto certe konas. Sed ne atendu la plej malgrandan eron de heleneco en tio. Edipo stulte petolas ("Vi nur ripozis, kvietita kiel fiŝeto. Ĝis baldaŭ, reĝino mia"), Jokasta karesnomas Tirezion "Ziĉjo" (!), kaj vortadas kiel putino en pariza bulvardo ("Ziĉjo, kiajn muskolojn! Mi ŝategas

la genuojn. . ." k.s.), per humuro, kiun oni emas konsideri neintenco. Tirezio mem, per konsterna malkohero, alterne solenas kaj stultumas (kp. p. 111: "Tio estas malhumana, mi scias; sed la ringo refermiĝas; ni devas silenti kaj resti ĉi tie," kaj p. 37-39: "Cervinjo mia. . . Kolombeto mia. . .").

Eble, iuj ŝatos tiun "senpolvigon" de la pragreka tragedio, kiel antaŭparolas la meritplena tradukinto; persone mi kredas, ke "La machine infernale" estas nur dokumento pri kultura malseriozo. La vivo kaj la verkaro de Jean Cocteau apartenas al la historio de moroj kaj modoj, ne al tiu de kulturo.

Mauro Nervi (Italio)

Laste aperis . . .

Korvo, La, kaj aliaj poemoj. El la portugala kaj la angla tr. Leopoldo H. Knoedt (1921-). Deklamas la tradukinto kaj Iracema Knoedt. Rio de Janeiro: Brazila Esperanto-Ligo, 1981. Kaseto kun tekstokajero (18p., 22cm.). Poemoj de Guerra Junqueiro, Coelho Neto, Edgar Allan Poe kaj Oscar Wilde (la longa "La balado de prizonato Reading"). Kun aldona orkestra muziko. Prezo: 21,00 gld.

Matenaj floroj kolektitaj en vespero (1928), Lusin (1881-1936). El la ĉina. Beijing: El Popola Ĉinio, 1981. 158p. 19cm. 10-Es-1387P. Sprita eseero, pri i.a. katoj, la popola ĉina lingvo, ĉinaj tradicioj kaj Tokio, kie Lusin studis. Prezo: 2,70 gld.

Mortinta, sed senmorta! Iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof, kajero 9. Kioto: Eldonejo Ludovikito, 1981. 518p. 22cm. Bindita. Verkoj, plejparte leteroj, el la jaroj 1909-1917. Inkluzivas la eseon "Gentoj kaj Lingvo Internacia" kaj diversajn homaranismaĵojn. Prezo: 36,00 gld.

Neĝa infano, Liu Si. El la ĉina. Beijing: El Popola Ĉinio, 1981. 40p. Kolorilus. de la aŭtoro. 21cm. 88-Es-179P. Bela fantazia rakonto pri familio de kunikloj kaj neĝa infano, kiu helpas ilin. Prezo: 3,00 gld.

Nova vortaro Esperanta-ĉina (1959). Kompilis Ĉina Esperanto-Ligo. Pekina Esperanto-Asocio, 1980 (represo). 6+328p. 13cm. Plasta kovrilo. Prezo: 15,00 gld.

Rakontoj de Oogai (1962), Oogai Mori (ps. de Rintarō Mori, 1862-1922). El la japana tr. T. Mikami, M. Miyamoto, K. Matuba kaj Y. Nozima. Tokio: Japana Esperanto-Instituto, 1979 (represo). 117p. 22cm. Bindita. Serio Oriento-Okcidento 2. Kvar noveloj de verkisto, kiu rolis ponte inter la literaturoj de Eŭropo kaj Japanio. Prezo: 18,30 gld.

Ŝtona testamento, La / Kiven testamentti, Reino Eriksson (1940-). Kuopio: Kustannuskiila Oy, 1981. 112p. 21cm. Poemaro en du lingvoj, la finna kaj Esperanto. Temoj ofte el la naturo. Prezo: 34,20 gld.

DIVERSAĴOJ:

Bindilo por la revuo "Esperanto". Ruĝa kvazaŭleda plasto. Ĉiu bindilo povas oportune teni plenan jarkolekton. Prezo: 9,00 gld.
Glumarkoj "Atomenergio? Ne dankon". Dudek glumarkoj sur vakspapero, ĉiu kun diametro 35mm. Prezo: 1,20 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4, kaj al tiuj de diskoj, insiginoj k.s. 18 procentoj por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas sendokostoj: por la mendoj sub la valoro de 200 guldenoj — 20 procentoj, por la mendoj super 200 guldenoj — 10 procentoj. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

67a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Antverpeno (Belgio) 1982 07 24-31

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Adreso de LKK: Frankrijklei 140, B-2000
Antwerpen, Belgio

Protektas la Reĝo. Lia Reĝa Moŝto Baldueno, suvereno de Belgio, akceptis roli kiel Alta Protektanto de la 67a Universala Kongreso. Duafoje li plenumas tian taskon: li protektis ankaŭ la 45an UK en Bruselo. Ankaŭ la antaŭaj du UKoj en Antverpeno (1911, 1928) ĝuis reĝan protektadon.



La 67a UK gastos en unu el la plej pitoreskaj kaj plej elegantaj eŭropaj urboj: Katedralo en Antverpeno (Foto Tas)

Guberniestro kaj urbestro en Honora Komitato. Jam akceptis membrecon en la Honora Komitato de la 67a UK la guberniestro de la provinco Antverpeno, s-ro A. Kinsbergen, kaj la urbestro de Antverpeno, s-ino M. Schroeyens.

Senatano denove prezidas LKK. Same kiel en Brazilio, la prezidanto de la Loka Kongresa Komitato estas senatano de la kongreslando. Temas pri s-ro Fernand Piot, kiu, ni eble menciui, jam pli ol tridek jarojn estas membro de UEA. Aliaj membroj de LKK estas Edward Symoens (vicprezidanto), Roger De Schepper (sekretario), Erhard Boehme (kasisto), Wim De Smet kaj Gerd Jacques. Revizoro estas Jules Verstraeten.

Zoologia ĝardeno senpage. En Antverpeno, la plej taŭga loko por granda kongreso estas nepre la konferenca salonaro de la Reĝa Zoologia Ĝardeno, kiu troviĝas tre oportune apud la ĉefa stacidomo. Tio do fariĝos nia kongresejo, kaj bestamantoj ĝojos scii, ke ĉiuj kongresanoj ĝuos senpagan aliron al la ĝardeno dum la tuta kongresa semajno. (Ĝiaj loĝantoj, aliflanke, ne ĝuos aliron al la Kongreso — ne timu, do, pri nova speco de "sovaĝa kongresano".)

Internacia Kongresa Universitato alvokas. Kiel kutime, kleriĝemaj kongresanoj povos aŭskulti spertulojn el la tuta mondo pri diversaj sciencaj kaj kulturaj temoj en la Internacia Kongresa Universitato, kies 35a sesio okazos dum la 67a UK. Universitataj profesoroj kaj simile kvalifikitaj personoj povas proponi prelegojn al la konstanta sekretario de IKU, prof. Bruce Arne Sherwood, 252 Eng. Res. Lab., University of Illinois, 103 S. Mathews, Urbana IL 61801, Usono. Bonvolu sendi, se eble en kvar ekzempleroj, proponon kun titolo, resumo, biografieto kaj reprezenta persona bibliografio, aldonante unu aktualan fotoportreton por eventuala uzo en la Kongresa Libro. Ĉiuj proponoj alvenu al prof. Sherwood ĝis la fino de 1981.

Generaciaj aspektoj de la Esperanto-movado. Jen la kongresa temo antverpena, al kiu ni dediĉas apartan spacon en ĉi tiu revunumero.

Tuttage pri instruado. Unu tago de la kongresa semajno estos dediĉita al la instruado de Esperanto. Antaŭvideblaj estas prelegoj kaj diskutoj pri moderna fremdlingva instrumetodiko, pri ekzistantaj kaj planataj instrumaterialoj kaj pri la vorttrezoro kaj strukturo de Esperanto kiel instruobjektoj. Eventualaj kontribuontoj al tiu tago skribu al la estrarano pri edukado de UEA, s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando.

Poŝtmarko denove — kaj ekspozicio. Bulgario en 1978, Svislando en 1979, Brazilo en 1981 — kaj en 1982 venos la vico de Belgio por eldoni specialan poŝtmarkon honore al la Universala Kongreso de Esperanto. Filatelistojn cetere ĝojigos la informo, ke

prepariĝas por la 67a UK ekspozicio pri Esperantaj poŝtmarkoj kaj glumarkoj.

Belartaj Konkursoj. En 1982 la Belartaj Konkursoj havos kvin branĉojn: poezio, prozo (maks. 200x65 literospacoj), eseo (pri temo lingva, literatura, historia aŭ sociologia, prefere en ligo kun la Lingvo Internacia aŭ ĝia uzado, proks. 400x65 literospacoj), dramo (ludodaŭro maks. 25 minutoj) kaj fotografio (nigra-blankaj aŭ koloraj verkoj, minimume 13x18cm.). Por konkursi en iu(j) el la unuaj kvar branĉoj, sendu la konkursaĵo(j)n (ne pli ol po 3 en ĉiu branĉo) en kvar ekzempleroj al la sekretario de Belartaj Konkursoj: s-ro Alec Venture, 22a Grosvenor Road, Wallington, Surrey, Britujo SM6 0EF, por atingi lin plej malfrue la 31an de marto 1982. Bonvolu kunsendi kvin ĝuste stampitajn internaciajn respondkuponojn por ĉiu branĉo, en kiu vi konkursas, se tion permesas la poŝt-reguloj de via lando. Konkursaĵojn por la fotografia branĉo oni sendu (po unu ekzemplero sufiĉas) al "Foto-Konkurso", per la adreso de LKK, por atingi tiun adreson ĝis la 1-a de julio 1982. Por ĉiuj branĉoj krom la esea ekzistas tri premioj: 250, 175 kaj 100 gld. Por eseo ekzistas nur unu premio, la premio "Luigi Minnaja", 310 gld.

Artistoj — ĉu ni konas vin? Pri la kongresaj artaj aranĝoj kunlaboras la konata kariljonisto Jo Haazen. Sed nek li nek LKK nek la oficistoj de UEA konas ĉiujn movadajn talentojn. Se vi opinias, ke viaj talen-



Beleco ne povas fariĝi eksmoda: Malnovaj komercistaj domoj kaj fontano en Antverpeno. (Foto: Guido Coolens)

toj — aŭ tiuj de iu, kiun vi konas — meritas la scenejon de Universala Kongreso, precipe se vi, aŭ tiu alia, neniam antaŭe prezentigis en UK, bonvolu skribi kun detaloj al la konstanta adreso.

Ankaŭ gejunuloj en Belgio. En Loveno (Leuven) renkontiĝos junaj esperantistoj por la 38a Internacia Junulara Kongreso (1982 07 31 — 08 07). Tie, oriente de Bruselo, troviĝas ne nur unu el la plej malnovaj universitatoj de Eŭropo, fondita en la 15a jarcento, sed ankaŭ la plej granda bierfarejo en la lando. La kongresanoj flandre foiros, popoldancos, sportos, ekskursos en la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo kaj kunsidos pri la temo "Scienco kaj socio". La kotizoj, ĝis la 15a de januaro 1982 (kiam ili altiĝos je 20-30 gld.), estas: por persono malpli ol 21-jara, 210 gld.; 21—25-jara, 230 gld.; 26—33-jara, 270 gld.; pli aĝa, 300 gld. Kiel kutime, la kotizo inkluzivas loĝadon (en dupersona ĉambro), manĝojn kaj la ekskurson. Aliĝiloj kaj informiloj estos baldaŭ haveblaj ĉe multaj landaj perantoj, ĉe UEA kaj ĉe la Loka Kongresa Komitato, 38a IJK, Duisburgsestr. 12, B-3030 Leuven-Heverlee, Belgio.

Blinduloj en Nederlando. Proksime al Antverpeno, 50 km. norde, en Breda, okazos (1982 07 31 — 08 06) la 50a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj, kiun organizas nederlandaj kaj flandraj esperantistoj. Tiu jubilea kongreso ricevas diversajn subvenciojn, i.a. 3000 guldenojn el la Blindula Kaso de la UK, al kiu viaj donacoj estas ĉiam bonvenaj.

Aliĝilo, Unua Bulteno, afiŝoj. Aliĝilo kaj Unua Bulteno de la 67a UK eliris kun la septembra numero de *Esperanto*. Iuj abonantoj ricevis, aldone, koloran prospekton pri Antverpeno; ĉar la stoko ne sufiĉis, aliaj ĝin ricevos post represo. Baldaŭ eldoniĝos ankaŭ serio de kvin afiŝoj pri la 67a Universala Kongreso kaj la 38a Internacia Junulara Kongreso (Lovenio). Ili estos verŝajne frue en 1982 haveblaj ĉe la kongresaj perantoj.

Kongresaj numeroj malaperas. Lige al la aŭtomatigo de la Centra Oficejo de UEA, en kies kadro sidas la kongresa administracio, la tradiciaj kongresaj numeroj estos forigitaj favore al la uea-kodo, kiu konsistas el kvin literoj kaj streketo, kaj kiu iom post iom asigniĝas al ĉiuj membroj por administrado de membrokotizoj, kontoj, kongresaj aferoj ktp. La konfirmilo pri kongresaliĝo montros la uea-kodon de la koncerna aliĝinto.

Kotizoj jarfine altiĝos. Pro la evoluo de la buĝeto tre eblas, ke la kotizaltigoj post la unua periodo estos pli grandaj ol kutime. La presita aliĝilo montras nur la kotizojn de la unua periodo, do validajn ĝis la fino de 1981, kiuj aperas ankaŭ ĉi-sube (en guldenoj). Kotizu frue kaj ŝparu!

1 Kongresano ne membro individua de UEA . . .	188
2 Kongresano individua membro (MJ) de UEA .	163
3 Kongresano individua membro (MA) de UEA .	125
4 Edz(in)o de kongresano en kat. 1	131
5 Edz(in)o de kongresano en kat. 2 aŭ 3	114
6 Junulo ĝis inkluzive 20-jara	56
7 Plentempa studento ĝis inkluzive 30-jara . . .	94
8 Blindulo	75

Ĉi tiun rubrikon redaktas: IAN JACKSON, p/a Esperanto-Centro, 140 Holland Park Ave., London, Britio, W11 4UF.

LANDAJ SEKCIOJ:

BEJO volas kongresi

BRAZILA Esperantista Junulara Organizo (BEJO) nun spertas eble la plej viglan jaron de sia agado. Jam fine de la 66a UK en Brazilio BEJO notis pli ol 60-procentan membrokreskon. Ĝuste la Kongreso en



Brazila Teatra Esperanto-Grupo (BRATEG) estas junulara ensemblo, kiu premiere prezentigis en la 66a UK.

Brazilio rolis kiel ĉefa stimulo por kvazaŭ veki la solan landan sekcion de TEJO en Sud-Ameriko. En tiu amasa Kongreso BEJO estis pli ol videbla, kaj sen ĝiaj anoj pluraj eroj de la kongresa programo — ne nur la junularaj — eble eĉ ne okazus. Tutaj junularaj hordoj invadis la kongresajn scenejojn dum preskaŭ ĉiu kultura programo en la Kongreso. Funkciis aparta junulara ĝiĉeto en la kongresejo. BEJO komplete pri-zorgis la Kongresan Libroservon, kies vendoj superis kvardek mil guldenojn. Tiun laboron gvidis mem la nova prezidantino de BEJO, Neima Cardoso Adôrno, kaj tra la tuta kongresa semajno tie deĵoris: Antonio de Freitas Leal, Maria Antonia Ladalardo, Teodolino Rodrigues Coutinho, Fabrício Rodrigues Valle kaj Alexandre Machado Rocha. La sindonemon de BEJO en tiu laboro la Kongreso premiis per 20-procenta partopreno en la gajno de la libroservo, kio verŝajne sumiĝos je ĉ. 2 000 guldenoj por BEJO. Almenaŭ provizore, tio liberigas la organizaĵon de financaj zorgoj, des pli, ke BEJO sciis ankaŭ alimaniere enspezi monon. Ekzemple, ĝi aĉetis ekzempleron de *Plena ilustrita vortaro* por 111,00 guldenoj, aranĝis loterion pri ĝi kaj — gajnis 431,85 guldenojn. Ankaŭ la kongresan butikon (memoraĵoj, bildkartoj ktp.) gvidis la vicprezidantino de BEJO, Néia Lucia Souza.

BEJO nun volas teni la entuziasmon, kiu inundis ĝiajn vicojn. Inter multaj planoj elstaras la okazigo de la 4a Brazila Esperantista Junulara Kongreso, inter la 28a kaj 31a de januaro 1982, en la nordorienta brazila urbo Natal. Por pliaj informoj skribu al: BEJO, Caixa Postal 11-1110, BR-70000 Brasília (DF), Brazilo.

INFORMOJ PRI LA 38a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO APERAS SUR LA APUDA PAĜO

LABORTENDAROJ:

Inundo de informpetoj

EN MARTO ĉi-jare la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER) de TEJO eldonis katalogon pri labortendaroj kaj similaj aranĝoj organizitaj precipe de la landaj sekcioj de TEJO. Ĝi aperis, krom en Esperanto, ankaŭ en la angla, franca kaj nederlanda lingvoj. Resumo de ĝia enhavo troviĝas en la aprila numero de ĉi tiu revuo (p. 74).

Jam meze de junio ĉiuj versioj estis komplete elĉerpitaj, kaj malfruaj informpetoj povis ricevi nur fotokopiojn. Evidentiĝis, ke la eldonkvanto, ĉefe de la angla versio, devos esti draste pligrandigita.

El la informpetoj, kiuj inundis la Centran Oficejon kaj la koncernan komisiiton de KER, dek venis de organizaĵoj kaj instancoj, naciaj kaj internaciaj, kiuj dediĉas sin aparte al la diskonigo de tiurilataj informoj, eldonante katalogojn, broŝurojn kaj adresarojn. Temas jen pri regionaj organizaĵoj, kiel "Junularo kaj Koope-rado" en Maroko, jen pri grandaj internaciaj instancoj kiel Kunordiga Komitato pri Internaciaj Volontulaj Servoj (CCIVS) ĉe Unesko, kun kiu TEJO jam de jaroj rilatas. Sekve, TEJO troviĝas en preskaŭ ĉiuj adresaroj

pri organizaĵoj kiuj aranĝas labortendarojn aŭ volontulan servon. En la komuna katalogo de CCIVS kaj Junulfako de Unesko aperis ankaŭ la adreso de UEA.

La aktivado en la kampo de labortendaroj estas grava ekstera agado, ĉar la plimulto de la informpetoj venis el landoj ankoraŭ ne aperantaj sur la mapo de la delegita reto, nome el la norda Afriko, kie la intereso koncentriĝas en Maroko kaj Egiptio.

Malgraŭ la sukceso sur la kampo de labortendaroj kaj spite al la reeldono de la lernolibro *Ĉu vi parolas tendare?*, ankoraŭ ne ekzistas sufiĉe da tiaspecaj aranĝoj malfermaj ankaŭ por neesperantistoj aŭ komencantoj. Tia malfermo do estas grava tasko ne nur por la landaj sekcioj de TEJO, sed fakte por ĉiu esperantisto, kiu ne estas ignoranta la intereson de multaj gejunuloj ĉie en la mondo.

Ĉiukaze, katalogo pri labortendaroj, volontula servado ktp. en Esperanta medio devas esti kompilita sufiĉe baldaŭ por certigi ĝustatempan informadon pri tio, kio tiukampe okazos dum 1982.

Do, pripensu la aferon kaj sendu planojn kaj informojn kiel eble plej baldaŭ, sed nepre antaŭ la 1-a de decembro, al la KER-komisiito pri labortendaroj: Martin Haase, Kiebitzweg 9, D-4600 Dortmund-50, FR Germanio.

Norvegio

- La Reĝa Norvega Ministerio de Eksteraj Aferoj restas ĉe sia pasintjara promeso utiligi Esperanton en sia informa laboro. Antaŭ nelonge aperis bela 8-paĝa informilo pri "La laponoj de Norvegio kaj ilia historio". Petu ĝin de la proksima norvega ambasado, kun la indiko de jena kodo: UDA 309/81 ESP.
- Nun ankaŭ la Esperanto-movado de Norvegio havas propran sidejon. La aĉetprezo de ducent mil norvegaj kronoj (ĉ. 87 000 gld.) venis komplete el donacoj kaj heredaĵoj de la norvega esperantistaro. La novan ejon utiligos Norvega Esperantista Ligo, Eldonejo Esperanto kaj la loka E-klubo en Oslo, kie la ejo troviĝas.

Bulgario

- En 1980, entute 47 nacilingvaj periodaĵoj aperigis 147 kontribuojn pri Esperanto. Kvarono de la menciitaj periodaĵoj estas gravaj tut-

landaj ĵurnaloj aŭ revuoj. Kvankam Bulgara Esperantista Asocio ne statistikis la kontribuojn pri Esperanto en la tutlandaj radio kaj televido, oni taksas, ke pasintjare pri la Internacia Lingvo temis ĉ. 100 radio-kaj pli ol dek televid-programoj.

Aŭstrio

- Ekde la 1-a de oktobro 1981, en Vieno eblas sekvi telefonan Esperanto-kurson. Similan eksperimenton oni faris antaŭ kelkaj jaroj en Usono.

Meksikio

- Meksikia Esperanto-Federacio montras signojn de vigliĝo: ĝi ĵus ekeldonis propran bulteneton kaj anoncas la organizon de Internacia Renkontiĝo Esperanta, inter la 13a kaj 16a de decembro 1981, en la fama feriejo Akapulko. Petu detalojn de: s-ro Emilio Arias, Retorno Central Poniente No. 17, México 74, D.F., Meksikio.

Interlingvistiko

- De la 11a ĝis la 18a de novembro 1981, en Paderborn (FR Germanio), okazos ampleksa scienca konferenco. Ĝi inkluzivos jenajn tri programojn: 6a Laborkonferenco pri Interlingvistiko en Klerigo kaj Scienco, 4a Internacia Konferenco pri Lingva Problemo en la Scienco, 2a Kolokvo de la Laborgrupo "Interlingvistiko" de Eŭropa Klubo. Aliĝkotizo estas 60 (por la membroj de Eŭropa Klubo 30) germanaj markoj. Ĝi inkluzivas ankaŭ la ĉeeston de ĉiuvesperaj kulturaj programoj, kiujn partoprenos i.a. la kantistoj V. Damjanov (Bulgario) kaj Jacques Le Puil (Francio) kaj la magiisto Trixini (Luksemburgo). Pliajn informojn petu ĉe: Instituto pri Kibernetiko, Kleinenberger Weg 16B, D-4790 Paderborn (telefono: 05251-64200).

Konkursoj

- En la traduka literatura konkurso de Itala Esperanto-Federacio, okazinta ĉi-jare (sub la aŭspicio de Belartaj Konkursoj de UEA), partoprenis 14 kandidatoj per 19 tradukoj. La unua premio iris al Gaudenzio Pisoni, la duan egale dividis Carlo Minnaja kaj Pier Giorgio Sorenzo, dum la trian gajnis Giulio Cappa. Tio estis la premioj en la poezia branĉo. Konkursis ankaŭ 6 tradukintoj de 6 prozaĵoj. Premiigis laŭvice: Luigi Tadolini, P.G. Sorenzo kaj Annamaria Montelbini. Nun Itala Instituto de Esperanto (Universitato de Verona, Via dell' Artiglierie 8, I-37131 Verona, Italio) anoncas

Fake

Bibliografio

- Marinko Gjivoje estas unu el la plej aktivaj bibliografoj en la Movado. Ne estas novaĵo, ke ĵus aperis plia volumeto de li — *Bibliografio de la tradukoj de verkoj de kroataj verkistoj en Esperanto* — kun listigo de 19 libroj kaj 367 revuaj tradukoj. Novaĵo tamen estas, ke tiu 36-paĝa broŝuro aperis kiel depresaĵo el nacilingva faka periodaĵo *Kroniko* de la Instituto pri Literaturo kaj Teatrologio de Jugoslavia Akademio de Scienco kaj Arto. Ĉu la kazo de Gjivoje signifas, ke, kiam ni faras fakan laboron kaj proponas ĝin al la ĝusta ekstermovada instanco, intereso pri Esperanto ne mankas?

Informado

- *L'espéranto* de Pierre Janton restas unu el la plej bonaj nacilingvaj informiloj pri la Internacia Lingvo kaj la Esperanto-movado. Ĝi jam havis du eldonojn en la franca (1973 kaj 1977). Sub la titolo *Einführung in die Esperantologie* (Enkonduko en la esperantologion) la

libro de Janton aperis en 1978 en la germana traduko. Ekzistas ĝia traduko ankaŭ en la hispanan. Nun oni anoncas, ke la itala traduko de tiu verko estas baldaŭ aperonta.



- Instruistoj: Tio kion la podia slogano sur la foto "salutas" estas la 15a Internacia Konferenco de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj). La Konferencon, kiu okazis inter la 11a kaj 21a de julio 1981 Gödöllő (Hungario), partoprenis 161 geinstruistoj el 15 landoj, ĉiuj eŭropaj krom Aŭstralio. Ĉi tiu instruista kunveno ricevis tre bonan atenton de hungaraj instancoj.

konkurson pri originalaj humuraĵoj, prozaj. La limdato estas la 30a de decembro 1981.

Manuskriptoj

- Interesan liston de "Esperantaj manuskriptoj de ĉeĥaj aŭtoroj" aperigis *Starto* 1981/4. Tie V. Novobilský mencias kvardekon da pretaj manuskriptoj de Esperantaj tradukoj aŭ originalaj verkoj. Ekzemple, kvin novaj tradukoj de la verkoj de Karel Čapek atendas eldoniston. Tio estas tre utila listo, ĉar gravas esti informita pri la ekzisto de tradukoj eĉ kiam ili ne sukcesis eldoniĝi libroforme.

Matematikistoj

- Internacia Asocio de Esperantistaj Matematikistoj (IAdEM) organizas laborkunvenon en La Chaux-de-Fonds (Svislando), inter la 30a de oktobro kaj la 2a de novembro. Skribu al la sekretario de IAdEM: d-ro F. Lo Jacomo, 14 rue de la Pompe, F-75016 Paris aŭ al Kultura Centro Esperantista, Poŝtfako 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds.

Muziko

- En 1976 fondiĝis Londona Esperanto-Ĥoro, kies gvidanto estas John Brownlee. Ĉiuj anoj de la Ĥoro estas esperantistoj kaj membroj de Londona Esperanto-Klubo. La Ĥoro nun havas en sia repertuaro pli ol 80 kvarvoĉajn kantojn el diversaj landoj – ĉiuj en Esperanto. Okazas regulaj koncertoj de la Ĥoro ne nur en la Klubo sed ankaŭ en Britaj Esperanto-Kongresoj.

Zamenhofologio

- En la Universitato de Lund (Svedio), Hans Henriksson pretigis doktoriĝan disertacion, kies titolo estas: "Esperantisma pontoreligio – Studo pri religiaj trajtoj en la frua epoko". La 260-paĝa manuskripto estas en la sveda, kun resumoj en Esperanto kaj la angla. Ĝi ekzamenas la fruan periodon de la Movado (ĝis la unua mondmilito) kaj la ideojn de Zamenhof krei universalan pontoreligion. La svedlingva titolo de la studo estas: "Doktor Esperantos brore religion – En studie av rewliĝösa drag i den tidiga esperantismen". Eventualaj interesitoj pri la studo skribu al la adreso de Sveda Esperanto-Federacio (Brunnsgatan 21, S-111 38 Stockholm), kiu esploras la eblecojn eldoni la verkon.

Austin

- Brition regas virinoj. Al la reĝino kaj la ĉefministro nun aldoniĝis ankaŭ s-ino Manjo Austin (vidu la foton), kiu antaŭ kelkaj monatoj fariĝis prezidanto de Esperanto-Asocio de Britujo, aliĝinta landa asocio de UEA. S-ino Austin havas antaŭ si laborplenan jaron, ĉar ŝi krome estas ankaŭ la sekretario



organiza de la 66a Brita Kongreso de Esperanto, okazonta inter la 9a kaj 12a de aprilo 1982 en Southampton.

Sherwood

- Prof. Bruce Sherwood de la Universitato de Ilinojso (Usono), kiu estas sekretario de la komisiono pri Internacia Kongresa Universitato, estas invitita al la Kolegio de Wilmington (Ohio) por en novembro ĉi-jare prelegi al la tieaj sciencistoj pri "La lingva problemo en internacia scienco". Pli frue, la 23an de junio 1981, Sherwood prelegis pri "Esperanto kaj kultura pluralismo" en la kadro de la simpozio pri "Alternativoj al kultura kaj lingva imperiismo", okazinta en la Universitato Duke (Norda Karolino, Usono).

Kořínek

- Jiří Kořínek fariĝis 75-jara la 1-an de oktobro 1981. Kvankam ankoraŭ ne aperis libroforme lia originala poemaro, Kořínek jam de pluraj jardekoj trudiĝas kiel unu el la plej elstaraj poetoj en Esperanto. Lia famo ŝuldiĝas al kontribuadoj en elstaraj periodaĵoj, kiel ekz. *Norda prismo*, *La nica literatura revuo*,

Persone



Paco, *La suda stelo*, *Fonto* k.a. Tiel oni povas klarigi, ke ĉi tiun poeton "sen poemaro" reprezentas ses poemoj en *Esperanta antologio*. Aliflanke, pluraj el liaj tradukoj ja aperis libroforme. En 1976, *Panoramo*, literatura almanako de la ĉeĥa periodaĵo *Starto*, aperigis mimeografe lian poezian kolekton *Vitreroj* (4,50 gld.).

Kawasaki

- Same kiel pasintjare, prof. Naokazu Kawasaki, renoma japana esperantologo, denove vizitis Ĉinion inter la 27a de aŭgusto kaj la 5a de septembro. Li estis en la urboj Hangzhou, Nanjing, Suzhou kaj Shanghai. Ĉinaj esperantistoj scivolis pri la Akademio, neologismoj, lingvistiko ktp.

Nekrologoj

THORKILD AARDESTRUP, membro de UEA ekde 1937, iama ĉefdelegito por Danlando (1953-56), mortis en majo ĉi-jare.

YVON MAY CANTY (1896-1981), dumviva membro kaj dum multaj jaroj fakdelegito en Auckland (Nov-Zelando), mortis la 20an de majo. Ŝi prizorgis elementan ekzamenon por Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, al kiu ŝi testamentis la ekvivalenton de pli ol dudek mil guldenoj.

FELIX DIEZ MATEO, iama membro de la Lingva Komitato (kiu poste fariĝis la Akademio de Esperanto), kiu prezidis en Grupo

Esperantista de Bilbao (Hispanio), mortis la 10an de julio. En la loka ĵurnalo *El Pueblo Vasco* li verkis Esperanto-rubrikon; li multe aktivis kiel E-instruisto, i.a. por teologoj en la Pontifika Universitato de Salamanca. Poligloto, li esperantigis plurajn verkojn el la rusa.

W.G. VAN EIJNDTHOVEN (1911-1981), kiu per siaj administraj talentoj helpis la laborojn de UEA, mortis la 31an de marto en Amsterdamo (Nederlando).

TOMO GREGUREK (1907-1981), aktivulo precipe antaŭ la dua mondmilito, fakdelegito pri sennaciismo kaj intersteno, forpasis la 17an de januaro en Koprivnica (Jugoslavio).

EMANUEL KULL (1900-1981), dumviva membro de UEA kaj fakdelegito en Falun (Svedio), forpasis la 13an de februaro.

HJALMAR ALDERIN LEIJDER, malnova esperantisto kaj aktivulo en la loka E-movado en Örebro kaj Linköping (Svedio), forpasis la 23an de majo.

JOHN WILLIAM LESLIE (1900-1981), kiu de 1951 ĝis 1967 servis kiel oficisto de Brita Esperantista Asocio, mortis la 3an de majo. Sub la pseŭdonimo "Verdiro" aperis en 1962 lia — ankoraŭ aĉetebla — politika kaj foje movadmoka artikolaro *Elingita glavo*, kies pika satira tono iam baris ĝian mencion en movadaj librokatalogoj.

MARTINUS (1890-1981), fama dana filozofo-spiritisto, kiu subtenis la ideon de Esperanto kaj tradukigis grandan parton de sia verkaro en la Internacian Lingvon, mortis la 8an de marto.

SYUZI MATUDA (1914-1981), delegito de UEA en Kanazawa (Japanio), forpasis la 10an de majo. Li estis tre aktiva en la loka E-movado. En 1964 aperis proveldono de lia traduko de *Kenzyu Parko-Arbaro*, 500-paĝa fabelaro de Kenzi Miyazawa. Ĉi-jare sekvis la volumeto *Japanaj noveloj* de K. Yuasa kaj T. Nagatuka.

EDWARD PHARO (1901-1981), antaŭa delegito de Philadelphia (Usono), fervora bahaano kaj esperantisto, mortis la 28an de majo.

LUDOVIKO SIEKIERSKI (1914-1981), kiu pli ol du jardekojn servis jen kiel prezidanto, jen kiel vicprezidanto de la filio de Pola Esperanto-Asocio en Gdańsk, forpasis la 9an de junio. Li lernis Esperanton en 1928, instruis ĝin en la Universitato de Gdańsk kaj estis konata kiel oratoro.

ENDRE TÓTH (1930-1981), blinda esperantisto, plurfoje premiita en Belartaj Konkursoj pro siaj noveloj, mortis la 28an de aprilo. Plej memorinda, eble, estis lia "Lappar, la antikristo", kiu gajnis la unuan premion kaj aperis en ĉi tiu revuo (1976 oktobro).

DAMJAN VAHEN-SVETINOV (1913-1981) forpasis en Brežice (Jugoslavio). Li estis malnova E-aktivulo kaj poeto. Aperis kvar liaj poemaroj: *Miaj vojoj* (1938), *Dum longaj vesperoj* (1940), *Dum noktoj senstelaj* (1941) kaj *Krioj el mallumo* (1963). En 1938 aperis lia traduko el la slovena de *Bapto de Savica* de F. Prešern. Li redaktis la revuon *Niaj vizaĝoj* (1937-39). En *Reeĥoj; Jugoslavia poemaro* (1961) Vahen-Svetinov estas reprezentita per kvin poemoj.

ELFRIEDA D. WALTERS (1907-1981), antaŭe delegito por Ĉikago (Usono), mortis la 26an de januaro.

Oficiala Informilo

N-ro 547

ŜANĜO DE KOTIZPERANTO EN USONO

Ekde la 1-a de oktobro, 1981, la perado de kotizoj por UEA en Usono estos prizorgata de la Centra Oficejo de ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530.

La Ĉefdelegito en Usono, s-ino Bonnie Helmuth, kiu ĝis nun prizorgis la kotizojn, plue administros la Delegitan Reton. UEA dankas al ŝi pro la kotizpera laboro de la lastaj du jaroj.

DUMVIVAJ PATRONOJ DE TEJO

Finnlando: T. Sormunen. Norvegio: Pepita de Caspary.

SOCIETO ZAMENHOF 1981

BELG: 195 G. Wyckmans. BRAZ: 196 Elmo Pereira Nunes. FRANC: 197 Roland Jossinet. NED: 198 W. C. Keizer. US: 199 B.J. Balcar; 200 Thomas A. Goldman.

DONACIOJ 1981 (Gld.) ĝis la 31a de aŭgusto

ASOCIA KAPITALO: Britio: Heredaĵo R.E. Ekberg 5 010,72. Sumo ĉi-jara 15 559,80.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Kana-do: P. Larose 79,40. Nederlando: R. Moerbeek 25,00; Akiko Ŭusink-Nagata 860,00; H.H. Weulen Kranenberg 200,00. Sumo ĉi-jara 5 220,84.

FONDAĴO CANUTO: Aŭkcio en Brazilio 1 299,57. Finnlando: U. Seppälä 30,05. Nederlando: H.H. Weulen Kranenberg 150,00. Norvegio: K. Gustavsén 106,97. Sumo ĉi-jara 3 594,97.

FONDAĴO ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO: Nederlando: H.H. Weulen Kranenberg 100,00. Sumo ĉi-jara 433,20.

FONDAĴO OFICEJA ILARO: Nederlando: H.H. Weulen Kranenberg 150,00. Sumo ĉi-jara 1 239,15.

FONDAĴO SCIENCO KAJ TEKNIKO: Nederlando: R. Moerbeek 200,00.

KOREKTO JARLIBRA

Pro teknika eraro en la Jarlibro 1981 (paĝo 148) aperis malĝustaj informoj pri Ĉina Esperanto-Ligo, pro kio ni sincere pardonpetas al ĈEL. La ĝustaj informoj tekstas jene:

Ĉina Esperanto-Ligo (aliĝinta al UEA): P.O. Kesto 77, Beijing (Pekino). Fondita en 1951. Membroj 1124. Organo: El Popola Ĉinio. Prez.: Hujucz, p/a Ĉina Esperanto-Ligo. Vicprez.: Bakin, Ĵelezo, Ĉen Juan, p/a Ĉina Esperanto-Ligo. Sekr.: Zhang Qi Cheng, p/a Ĉina Esperanto-Ligo. Libroservo: Esperanto-sekcio de Guoji Shudian, P.O. Kesto 313, Beijing (Pekino).

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Alĝerio: M. Dobrzyński. Britio: D. Masterman; E.R. Waterworth. Finnlando: Tapio Sormunen.

FONDAJO TEJO: Nederlando:
H.H. Weulen Kranenberg 100,00.
Sumo ĉi-jara 731,74.

ĜENERALA KASO: Argentino: A. Montesinos de Gomis 82,50; R.G. Calógero 28,57; Silvia E.R. de Zorzoli 28,57. Aŭstralio: L.V. Scott 28,57. Belgio: Germaine Wolff 1 000,00. Brazilo: J. Ferreira Barboza 28,57; P. Amorim Cardoso 28,57; I. Noguti 14,28; E. Pauli 28,57; A. de L.B. Pereira 28,57; C. Rezende 28,57; W.V.L. Rubio 14,28; M. Borges dos Santos 14,28; G. Carneira dos Santos 14,28; V. Marcelino da Silva 142,85; Newton Xavier 28,57. Ĉilio: I. Mättig 13,75. FR Germanio: F. Teltz 16,67. Japanio: Oomoto 142,86. Jugoslavio: E. Lapenna 14,28. Kanado: Ges-roj Daoust 28,57. Nederlando: W. Rodenhuis 200,00; H.H. Weulen Kranenberg 100,00; E.J. Woessink 860,00. Svedio: G. Tistad 55,00. Anonima 300,00; Anonima 51,52. Diversaj malgrandaj 68,37. Sumo ĉi-jara 11 111,41.

NOV-JORKA OFICEJO: Patronoj (minimуме \$100): Argentino: R. Diaz Morilla. Aŭstralio: Chick Errol; F.F. Koppel (297,85 gld); Libro servo de Aŭstralio E-Asocio; W.T. Steele (313,60 gld). Finnlando: Nordlandano (577,67 gld); Pentti Silander (300,84 gld); Tapio Sormunen. Usono: Pierre Collinge; Calvin Cope; Margot Gerson (\$200); Francis Helmuth; Marion Newell-Lorie; Jaqueline Reynolds; Sidney Steinberg. Amikoj (minimуме \$10): Aŭstralio: S. Kanacki (78,40 gld); K.G. Linton (78,40 gld). Belgio: L. Drèze. Brazilo: M. Bijleveld; Alberto C. Curopos; Helmuth Schenk (57,14 gld). Britio: Peter Basten (100 gld); Grahame Leon-Smith. Finnlando: Anonima (70,74 gld); Vuokko Heinäsuo (30,08 gld); A. Mehtonen; Liisi Oterma (137,50 gld); Terttu Österman (72,15 gld); J. Pyykonen (60,20 gld); Unto Seppälä (30,05 gld); T. Tähtinen (114,28 gld); H. Tietti (30,10 gld); V. Tietti (30,10 gld); Erkki Väisänen (30,05 gld). Hispanio: A. Fighiera-Sikorska. Ita-

Kotiztabelo por 1982

Lando/Valuto	(J-)AM	MJ(-K)	MA(-K)	SA	Kto	SZ
Argentino/peso*	2900	58000	145000	87000	43500	290000
Aŭstralio/dolaro	0,50	10	25	15,00	7,50	50
Aŭstrio/ŝilingo	8	160	400	240	120	800
Belgio/franko	19	380	950	570	285	1900
Brazilo/kruzeiro*	30	600	1500	900	450	3000
Britio/pundo	0,25	5,00	12,50	7,50	3,75	25,00
Bulgario/guldeno	0,85	17,00	42,50	25,50	12,75	85,00
Ĉeĥoslovakio/krono	6,50	130,00	325,00	195,00	97,50	650,00
Ĉilio/peso	16	320	800	480	240	1600
Ĉinio/guldeno	0,75	15,00	37,50	22,50	11,25	75,00
Danlando/krono	3,80	76	190	114	57	380
Finnlando/marko	2,20	44	110	66	33	220
Francio/franko	2,70	54,00	135,00	81,00	40,50	270,00
FR Germanio/marko	1,20	24	60	36	18	120
Germana DR/guldeno	1,10	22,00	55,00	33,00	16,50	110,00
Greklando/draĥmo	22	440	1100	660	330	2200
Hinda Unio/rupio	2,40	48	120	72	36	240
Hispanio/peseto	35	700	1750	1050	525	3500
Hungario/forinto	11	220	550	330	165	1100
Irano/guldeno	0,80	16	40	24	12	80
Irlando/pundo	0,23	4,60	11,50	6,90	3,45	23,00
Islando/krono	3,80	76	190	114	57	380
Israelo/siklo	5	100	250	150	75	500
Italio/liro	460	9200	23000	13800	6900	46000
Japanio/eno	105	2100	5250	3150	1575	10500
Jugoslavio/dinaro	12	240	600	360	180	1200
Kanado/dolaro	0,68	13,60	34,00	20,40	10,20	68,00
Kolombio/peso	13	260	650	390	195	1300
Korea Resp./ŭono	260	5200	13000	7800	3900	26000
Luksemburgo/franko	19	380	950	570	285	1900
Meksikio/peso	9	180	450	270	135	900
Nederlando/guldeno	1,25	25,00	62,50	39,00	19,50	125,00
Norvegio/krono	3,20	64	160	96	48	320
Nov-Zelando/dolaro	0,58	11,60	29,00	17,40	8,70	58,00
Peruo/guldeno	0,75	15,00	37,50	22,50	11,25	75,00
Pollando/guldeno	0,90	18,00	45,00	27,00	13,50	90,00
Portugalia/eskudo	20	400	1000	600	300	2000
Soveta Unio/guldeno	0,95	19,00	47,50	28,50	14,25	95,00
Sud-Afriko/rando	0,45	9,00	22,50	13,50	6,75	45,00
Svedio/krono	3,10	62,00	155,00	93,00	46,50	310,00
Svislando/franko	1,20	24	60	36	18	120
Urugvajo/peso	4	80	200	120	60	400
Usono/dolaro	0,60	12	30	18	9	60
Venezuelo/bolivaro	2	40	100	60	30	200

ALIAJ LANDOJ: Laŭ pola tarifo: Hongkongo, Malto, Singapuro. Laŭ irana tarifo: Alĝerio, Irako, Jamaiko, Kostariko, Kubo, Libano, Maŭricio, Panamo, Portoriko, Rumanio, Svazilando, Turkio, Nederlandaj Antiloj. Laŭ ĉina tarifo: ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj. Por ĉiu validas la tarifo de la nuna loĝlando. Ĉiuj kotizoj supre menciitaj validas por la kalendara jaro.

(J-)AM = (Juna) Asocia aŭ Aligita Membro (koncernas nur landajn asociojn)
MJ(-K) = Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 25 jaroj, *Kontakto*)
MA(-K) = Individua Membro-Abonanto (kiel MJ(-K), plus revuo *Esperanto*)
SA = Simpla Abono de la revuo *Esperanto*, sen membreco en UEA
Kto = Abono al la revuo *Kontakto*, sen membreco en TEJO
SZ = Kotizo por Societo Zamenhof (ne inkluzivas membrecon en UEA)

* La tarifo validas nur por pagoj faritaj ĝis la fino de 1981! Posta tarifo anoncota.

**Antaŭdankon pro
la frua pago de via
kotizo! Tiel vi helpas
la laboron de la CO.**

lio: C. Dragoni. Japanio: Tosihide Kuwahara. Kanado: Ges-roj Daoust; Ges-roj Eichholz (\$20); Louise Labelle; Joseph Lederman (44,50 gld); Guy Matte (\$K20); Trefflé Mercier; Ron Ogram; Maurice Provost; Paul Puvrez; John Thomson; Edward Woodruff. Liberio: R. Sachs. Nederlando: D. Goslinga. Svedio: I. Eriksson (41,25 gld); Amy Nilsson (51,00 gld). Svislando: A. Braun (139,56 gld). Usono: B.J. Balcar; A.M. Chapman; Lura Chapman (\$20); Ges-roj Crook (\$20); John Futran (\$60); Gizella Giguere (\$20); Audrey Janisen (\$20); Salomon Jelfgot (\$50); Kevin Laughery (\$25); Jack Lesh (\$50); W.L. Mellson; Annelou Neunzert;

Wm. A. kaj Phyllis Shanks; Francis Sumner (\$25); Eugene Thompson (\$20); William Worrell (\$15). Venezuelo: E.E. Mosonyi. Ceteraj donacoj: Aŭkcio en la UK (1299,57 gld). Diversaj malgrandaj (62,09 gld). Sumo ĉi-jara 21 607,18 gld.

PATRONOJ DE TEJO: 47 H. Bakker, Nederlando. 48 F. Piot, Belgio. 49 U.J. Moritz, FR Germanio. **PROPAGANDA KONTO:** Nederlando: H.H. Weulen Kranenberg 150,00.

FONDAĴO AGADO ĈE UN KAJ UNESKO: Nederlando: H.H. Weulen Kranenberg 200,00. Sumo ĉi-jara 2 754,44.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

14-15-jaraj gelernejoj deziras korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj. Respondu al: Esperanto-Kurso, Astradskolan, S-341 00 Ljungby, Svedio.

La adreso ŝanĝita: Mehdi Zargarpur, P.O. Kesto 410, Busher, Irano.

Tutmonda esperantista adresaro 1981 aperis (eldonejo: Info-Servo, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio). Ĉ. 2700 adresoj el ĉ. 60 ŝtatoj, kun indikoj pri aĝo, profesio, grado de E-sciado, deziro korespondi, preteco gastigi. Tuj mendu ĝin ĉe vialanda libroservo!

Ĉe-metode instruadu ankaŭ vi, private aŭ lerneje, laŭ: *Esperanto laŭ la patrina metodo*, 320 paĝoj, GM 50,00! 50-instruhora kabareto lernigas esperante kaj germane ĉiujn demandojn kaj respondojn de la ĉiutaga konversacio! August Weide, Nordalbingerweg 65, D-2000 Hamburg 61, poŝtĝirkonto Hamburg 150 58-209.

Pakistana novulo volas korespondi diverslande pri fotografio, kulturo, muziko ktp. Skribu al: s-ro Muhammad Naeem Javed, 371/8 Soap Street, Inside Haram Gate, Multan, Pakistano.

Vartist(in)o por 2-jarulino serĉata. Flua uzo de Esperanto necesas. Nutrota. Loĝigota. Poŝmono. Ebleco lerni la francan, kunvojaĝi tra Esperantio. Skribu al: Gaspard, 15 rue Clermont, F-46100 Figeac, Francio.

Deko da diversaĝaj medicinistoj (kuracistoj, flegistoj, teknikistoj) serĉas korespondantojn, prefere samfakajn. Skribu al la kursgvidanto: d-ro Georgi Popov, str. Stambolijski 54, BG-9850 Preslav, Bulgario.

Pensiulo deziras tutmonde korespondi. J. Potocka, Bratyslawska 19/66, PL-90-040 Łódź, Pollando.

Kiu korespondos kun mi pri ĝenerallaj temoj: Hans-Joachim Krieg, Klosterstr. 11, DDR-4900 Zeitz, Germana DR.

Tri gefratoj, 12-, 13- kaj 14-jaraj, deziras tutmonde korespondi kun gesamaĝuloj: Zahra, Mohammed kaj Mahmud Zuelm, Kheyaban Tehran, Turisti, Kucheh Dorri numero 5, Saveh, Irano.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,85 guldenon (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj mem, kiuj bonvolu memori, ke rabaton por sinsekvaj ripetoj ni donas nur al enkadrigitaj anoncoj, kiel tiuj sur la kontraŭa paĝo, sed ne al anoncetoj.

Pri internacia pacdevigo volas korespondi John C. Lincoln, 3320 East Weldon, Phoenix, Arizona 85018, Usono.

Por perfektigi lingvoscion volus korespondi 30-jara: f-ino Nusrat Forogh, Microjan Block 28A, Ap. 33, Kabul, Afganistano.

16-jara knabino deziras korespondi. Mi kolektas poŝtmarkojn kaj diversajn esperantaĵojn. Irina Sedova, Prospekt M. Toreza 13-4, SU-1904021 Leningrad, Soveta Unio. Telefono: 247 51 06.

Pedagogo 32-jara deziras tutmonde korespondi kun denaskaj geesperantistoj: Mehdi Zargarpur, P.O. Kesto 410, Busher, Irano.

23-jara viro deziras korespondi. Interesiĝas pri literaturo, fremdaj lingvoj kaj turismo: Kazimierz Dąbrowski, ul. Koreańska 1/226, PL-52-121 Wrocław, Pollando.

Ŝparu ĉe UEA! La unuaj membroj, kiuj faris fiksdatan mondeponon ĉe UEA, jam ricevis la 6-procentan renton por la unua deponjaro. Ankaŭ via mono povas doni al vi renton de 6% en guldenoj. Samtempe vi helpas la Asocion. Petu la regularon ĉe la Centra Oficejo.

Ideala feriejo por esperantistoj estas Gastejo Edmond Privat de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Petu informilon!



Tutmonde, pri ĉiuj temoj, deziras korespondi 18-jara: f-ino Firuzeh Moattar, Tehran-Gholhak-Dowlatabe., Ashafi Sarraf Ave. no. 26, Tehran 19, Irano.

Kun virinoj, junaj kaj pli aĝaj, volus korespondi 19-jara: s-ro Heidari Kareh, Yousef-Abad-Bistoon St. 26A Ave. No. 1, Tehran, Irano.

"Post la kurso la homoj disiras kaj perdas la intereson pri Esperanto." Plendoj similaj — kiu aktivulo ne konas ilin kaj do demandas sin, ĉu entute valoras la penon doni kursojn. MONATO estas bonega rimedo superi ĉi tiun krizan punkton en la E-instruado. MONATO helpas vin kaj *dum* progresiga kurso (pro ĝia lingvo ĉiutaga) kaj helpas vin *poste* ligi kursanojn al la lingvo Esperanto (pro ĝia enhavo interesa). Se ankaŭ vi volas, ke E-lernintoj ne perdiĝu por la movado, petu varb-materialon ĉe Eldonejo TK/Stafeto. **Atentu: Por kursoj specialaj rabatoj!**

MONATO

internacia magazino sendependa

40 paĝoj DIN A4, riĉe ilustrita. Dek unu kajeroj plus poŝkalendaro jare. Jarabono 59,50 gmk aŭ 960 bfr. La abonon bonvolu sendi rekte al la eldonejo: TK/Stafeto p.v.b.a., Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio — aŭ mendu ĉe landa peranto aŭ UEA (64,00 gld.; por Nederlando 66,56 gld.). Petu provekzempleron kontraŭ du int. respondkuponoj. (Tamen memoru, ke unu persono povas nur unufoje fari tian peton.)

Londono vokas

La historio de la unuaj 75 jaroj de la Londona Esperanto-Klubo, verkita de Harry Holmes.



Aperos en novembro!

A5, kun 132 paĝoj kaj multaj ilustraĵoj.

£3, aŭ ekvivalento.

Mendu ĉe UEA, ĉe via

libroservo aŭ rekte de la Londona Esperanto-Klubo, 153 Drummond Str., London NW1 2PB. Girokonto 54 661 0005



Mendu nun viajn UNICEF-salutkartojn por la nova jaro kaj por la Semajno de Internacia Amikeco. Dek kartoj kun kovertoj (minimuma mendokvanto): 11,00 guldenoj ĉe la Libroservo de UEA. (Sen rabato por revendistoj.)

ATENTON! KOMERCISTOJ!

Negoca ebleco 1

Granda usona fabrikisto de diversspecaj produktoj por sano serĉas distribuantojn (vendejojn) en via lando por la jenaj:

Ungventoj: "Bacitracin"; A- kaj D-vitamina; trioble antibiotika; unuahelpa kremo; vazelino; zinka oksido; hidrokortizona kremo; artrita kremo, ktp.

Por doloro/dormo: aspirino; bufrita aspirino; senaspirinaj dolormildigaj tablojdoj; artritaj dolormildigaj tablojdoj; dormigaj kapsuloj, ktp.

Por tuso/malvarmumo: deskongesta tusosiropo; naza ŝprucaĵo "Ephrine"; antialergiaj tablojdoj; deskongestaj tablojdoj; malvarmumaj kapsuloj

Laksetigantoj: minerala oleo; vegetaĵa pulvoro; diarea kombinaĵo "Kaolin-Pektin"; antiacidaj tablojdoj, ktp.

Antisepsaĵoj: alkoholo; hamamelido; hidrogena peroksido, ktp.

Por beboj: ŝampuo; beba oleo; beba pudro; vazelino, ktp.

Por razado: razkremo; postraza adstringaĵo, ktp.

Por dieto: sakarino en tablojdoj aŭ likvaĵo

Unua helpo: unuahelpa kremo; kalamina kremo; "mercurachrome"; jodo; ungvento "Bacitracin", ktp.

Insekticidoj: ŝprucaĵo kontraŭ formikoj kaj blatoj

Vitaminaj: kompleta aro de vitaminoj kaj mineraloj; multoblaj vitaminoj; vitamino-C; vitamino-E; B-kompleksaj kaj specialaj vitaminoj; inklude ajlajn kapsulojn, ktp.

Flego por vizaĝo kaj manoj: manaj kremo; vizaĝaj kremo; E-vitaminaj malsekigantoj; ungaj farboj, ktp.

Flego por hararo: ŝampuoj; plibonigantoj; kremaj lavaĵoj; kontraŭskvametaj ŝampuoj, ktp.

Flego por buŝo: dentopasto; dentopasto por fumantoj; buŝlavaĵo, ktp.

Flego por orelo/okulo: okulaj lavaĵoj kaj gutoj; oreloj gutoj, ktp.

Kvalifikitaj kaj spertaj komercistoj sendu informojn pri vi kun viaj demandoj al la suba adreso.

Negoca ebleco 2

Vendista entrepreno serĉas unikajn produktojn kun ekonomia valoro por vendado en la usona merkato. Sendu kompletajn informojn al:

R. Kent Jones
452 Aldine, Apt. 501
Chicago, IL 60657, Usono

Kiom el niaj revuoj aperigis la septembran numeron jam en julio? Almenaŭ unu:



kiu per sia unua jarkolekto (oktobro 1980 – septembro 1981) firme establiĝis kiel la beletra revuo de la okdekaj jaroj.

Redaktoro: William Auld. Aperas ĉiumonate: 12 ilustritaj kajeroj, po 44p., jare.

Enhavo de la unua jarkolekto: 40 originalaj noveloj, 29 tradukitaj noveloj (el 9 lingvoj), 108 originalaj poemoj, 143 tradukitaj poemoj (el 25 lingvoj), 2 teatraĵetoj kaj 3 longaj recenzoj.

Ankoraŭ haveblas la unua jarkolekto kontraŭ **35,00 gld.** Abonojn por la 2a jarkolekto akceptas la Libroservo de UEA. Prezo: **39,00 gld.** (plus 4%, nur por nederlandaj klientoj).



Eldonisto:
Gersi Alfredo Bays
Caixa Postal 49
BR-89800 Chapecó (SC)
Brazilo

Brazilaj filatelaĵoj nun estas aĉeteblaj

La bela brazila poŝtmarko, eldonita omaĝe al la 66a Universala Kongreso, estas havebla ĉe la Libroservo de UEA en kompletoj de jena konsisto:


- A. Unuataga koverto plus Edital-folio 5,40 gld.
- B. Kiel A, plus bloko de 4 neuzitaj pm 7,50 gld.
- C. Kiel B, plus paro aŭ kvaropo de uzitaj poŝtmarkoj 9,00 gld.



Se vi mendas nur la filatelaĵojn, pensu pri la minimumaj sendokostoj de 5,00 gld. Nederlandaj klientoj bv. aldoni 4 procentojn da imposto. Je mendo de almenaŭ tri samspecaj kompletoj vi ĝuas la kutiman trionan rabaton.

Plena analiza gramatiko de Esperanto kompletigas la kvaropon

Kiam en 1970 aperis *Plena ilustrita vortaro* (135,60 gld.), ĝi estis la sola baza verko havebla en la movada libromerkato. En 1974 aldoniĝis al ĝi *Esperanto en perspektivo* (84,00 gld.). Antaŭ du jaroj, Hungara Esperanto-Asocio reprenis la malnovan *Enciklopedio de Esperanto* (45,00 gld.), kaj — fine — per la eldono de *Plena analiza gramatiko de Esperanto* UEA kompletigis tiun eminentan kvaropon de la bazaj kaj elĉerpaj konsultolibroj pri (pli-malpli) ĉiuj aspektoj de la Internacia Lingvo kaj la Esperanto-movado.



Se la vendoritmo de *Plena analiza gramatiko* konserviĝos ankoraŭ por ioma tempo, tiu lasta aliĝinto al la kvaropo estos ankaŭ la unua kiu ekmankos denove, ĉar en iom pli ol duona jaro de post la apero, duono de la eldonkvanto de 3000 ekzempleroj jam estas for. Indas do rapidi!

Plena analiza gramatiko de Esperanto (1935), K. Kalocsay (1891-1976) kaj G. Waringhien (1901-). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1980 (4a tralaborita eldono). 599p. 22cm. Bindita. ISBN 92 9017 022 0. Prezo: 48,00 (por Nederlando 49,92) gld., plus sendokostoj. Triona rabato ekde 3-ekzemplera mendo.